# HUNGARA VIVO

5
1983
13,— Ft

# NI ENTREPRENU KUNE!



Via kunlaboro estas nia forto
Vi planas, ni produktas

bubiv

MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

**HUNGARA VIVO**

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H-1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H-1368
Aperas dumonate
XXIIIa jaro, 1983 n-ro 5
(111)

ENHAVO

La solena inaŭguro 162
*Butler,* R.E.: Monda Komunika Jaro kaj ŝlosiloj al komunikado 164
*Fenyvesi,* E.: Malfermo 167
Akcepto en la Parlamentejo 168
Jubilea kunveno de MEM 170
Vesperoj en la Kongresejo 172
Pri la teatraj programoj 174
Gabi Jobba (1947-1983) 177
La nova Estraro de UEA 178
Kongresa Panoramo 179
*Mihalkov,* G.: Hungara bukedo por la Kongreso 183
*Barcsay,* Zs.: La 20a Internacia Infana Kongreseto 184
*Fenyvesi,* E.: La ferma kunsido 185
*Pekár,* I.: Tri jardekoj por la moderna hidrotekniko 187
*Monostori,* E.: Prezentas sin la Entrepreno por Fabrik- kaj Maŝinmuntado (*Ervin Fenyvesi*) 191
*Fenyvesi,* E.: Kongresa Gaja Paĝo 197
Korespondi deziras 198
*Mihalkov,* G.: Ekzameno sen risko 199
Krucenigmo 199
Leterkesto 200

Sur la frontpaĝo: La Alta Protektanto, Sándor Gáspár salutas la 68-an UK (Foto de Z. Fejér)

# 5010 kongresanoj partoprenis...

la 68-an Universalan Kongreson de Esperanto en Budapeŝto inter la 30-a de julio kaj la 6-a de aŭgusto. Estas do superita la sesdekjara rekordo de la 15-a UK en Nurenbergo (1923). Al la 15-a UK aliĝis tiutempe 4963 personoj, kvankam vere ĉeestis ĝin nur ĉ. 3500, almenaŭ tion asertas la veterano *Teo Jung* en sia libro *Ĉiu ĉiun* (p. 161.).

Estas do kompreneble, ke kongresaj raportoj plenigas do tiun ĉi numeron de Hungara Vivo; ni esperas, ke ĉe la plimulto de la legantaro la raportoj trovos plaĉon, ja ili revivigos agrablajn memorojn en tiuj, kiuj partoprenis la Kongreson en Budapeŝto, kaj donos almenaŭ skizan bildon pri la granda evento al tiuj, kiuj ne povis veni al la hungara ĉefurbo. Ni devas diri, ke eĉ ne ĉiuj raportoj trovis lokon en tiu ĉi numero, do, la temon «UK» oni povos renkonti eĉ en 1983/6, kiu — espereble — sufiĉe frue troviĝos en la leterkesto de la abonantoj.

El tiu ĉi numero ni speciale rekomendas al vi la raportojn pri la solenaĵoj de la 68a UK: ili bele demonstras, kiel grandan atenton la hungaraj aŭtoritatoj donis al la Kongreso. Meritas tre atentan legadon ankaŭ la prelego de Richard E. *Butler,* kiu inaŭguris la kongresan ĉeftemon, pri kies ampleksa traktado detala raporto aperos en la sekva numero.

La 68a UK havis tian riĉon de programoj, ke fakte maleblas trovi personon, kiu ĉeestis almenaŭ ĉiujn vere gravajn programerojn. Pro tiu riĉo iuj kongresanoj eĉ plendis, dirante, ke la dilemo elekti inter la interesaj programoj kelkfoje estis doloriga. Tiel estis, kaj tio ne estas mirinda, ja por 5010 kongresanoj ne eblis prepari la saman menuon...

En tiu ĉi numero oni vane serĉos iujn kutimajn rubrikojn: mankas *Revuo de revuoj* (ni revuis la kongresajn aranĝojn), mankas *Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado* (la tuta numero prezentas unu tian ĉapitron), *Panoramo* ankaŭ «kongresiĝis». Mankas ankaŭ literaturaĵoj, sed aperas informaj artikoloj pri hidrotekniko kaj pri la *Entrepreno de Fabrik- kaj Maŝinmuntado,* ni ne volas prisilenti, ke la aperigo de tiuj artikoloj iom kontribuas al niaj financoj, sed ni estas certaj ankaŭ, ke tiuj niaj legantoj, kiuj favore akceptis nian novan rubrikon pri fakterminoj, volonte legos nun vere fakajn tekstojn.

Ĉe la redaktofino ni ricevis la doloran informon pri la morto de aktorino *Gabi Jobba,* kies Petőfi-recitalo laŭ la planoj estus unu el la atutoj de la kultura programaro de la UK — sed enhospitaliĝo malhelpis ŝin veni al la Kongreso. Kaj post malpli ol monato ŝi mortis.

# La solena inaŭguro

Estas ankoraŭ dimanĉa frumateno, sed jam miloj da kongresanoj svarmas en la impone ornamita, grandioza, pluretaĝa Kongresejo kaj sur ties larĝaj terasoj garnitaj per multaj E-flagoj. Ĉie ajn videblas ĝojoplenaj renkontiĝoj kaj brakumoj, aŭdiĝas vokoj kaj mokoj de geamikoj revidantaj unu la alian. La febra entuziasmo regas en kaj ĉirkaŭ la Sporthalo Budapeŝt; la plenforte ardanta suno do senbezone montras sian (tro varman) simpation al la esperantistoj.

En la giĉetoj rapidaj manoj distribuas la kongresajn dokumentojn en plaĉaj lino-sakoj (pro tiuj estos baldaŭ rekoneblaj la kongresanoj sur la Budapeŝtaj avenuoj kaj en la magazenoj). Agemaj deĵorantoj pene boras sin tra la homamaso por urĝaj aferoj; abundegas ja preparindaĵoj en la plej granda postmilita Kongreso de la E-movado (feliĉe, restis nur kelkaj korektindaĵoj dum la sekvaj kongrestagoj, ĝenerale kontentige kaj glate pasantaj).

Al la kongreso aliĝis 4834 esperantistoj, sed la Inaŭguron partoprenis pluraj centoj da esperantistoj-nekongresanoj, tiel pli ol 5000 homoj plenigis la egan Sporthalon, kiam la prezidanto de UEA, *Grégoire Maertens* solene malfermis la *68an Universalan Kongreson de Esperanto.* Li dediĉis dankvortojn al la gastigantaj hungaraj esperantistoj: «unu el la plej elstaraj E-komunumoj, kiu donis al nia lingvo gigantojn.» Tondra aplaŭdo esprimis la konsenton de la kongreso.

Responde la prezidanto de LKK, parlamentaro *Endre Baráth* elkore bonvenigis ĉiun kongresanon. *Flóra Szabó-Felső,* ĝenerala sekretario de UEA, prezentis al la publiko la podianojn, inter ili plurajn eminentulojn: *Richard E. Butler,* ĝeneralan sekretarion de la Internacia Telekomunika Unio; *Sándor Gáspár,* vic-prezidanton de la Prezidio de la Hungara Popolrespubliko (vic-ŝtatestron), la Altan Protektanton de la 68a UK; *István Sarlós,* vic-ĉefministron, prezidanton de la Honora Komitato de la 68a UK; kaj *Bertalan Farkas,* la unuan esperantistan kosmonaŭton, membron de la Honora Komitato. Ĉiujn aplaŭdojn superis tiu, kiu akompanis la gaje enmarŝantajn *infanojn de la «Kongreseto»*, kaj ĉies koron ravis la knabinkuraĝe prononcitaj ĉarmaj salutvortoj.

La kongreso poste atente aŭskultis la mallongan, sed sincertonan salutparoladon de la Alta Protektanto, *Sándor Gáspár,* vicprezidanto de la Prezidio de la Hungara Popolrespubliko, membro de la Politika Buroo de la Hungara Socialisma Laborista Partio, ĉefsekretario de la Hungara Nacia Konsilio de Sindikatoj, prezidanto de la Monda Federacio de Sindikatoj.

La kongresan temon inaŭguris la prelego de *R.E. Butler,* kiu estas ankaŭ la ĉefkunordiganto de la Monda Komunika Jaro. La anglalingvan prelegon la kongresanoj sekvis pere de la

**Ne malpli ol 5500 personoj plenigis la Salonon Zamenhof dum la Solena Inaŭguro. Ekzistis specialaj enirbiletoj nur por tiu ĉi aranĝo, kaj profitis la eblon multaj Budapeŝtaj esperantistoj, kiuj ne povis partopreni la tutan Kongreson (Foto de Z. Fejér)**



**Parto de la podio. De maldekstre: Lajos Kelemen, vic-urbestro de Budapeŝto; Endre Baráth, prezidanto de LKK; Sándor Gáspár, la Alta Protektanto; Grégoire Maertens, prezidanto de UEA; Flóra Szabó-Felsö, ĝenerala sekretario de UEA; István Sarlós, prezidanto de la Honora Komitato (Foto de Z. Fejér)**

distribuita Esperanta tradukaĵo.

— La telekomunikaj aparatoj *bezonas nepre lingvon,* ĉar manke de tiu interkomprenilo eĉ la plej moderna maŝino iĝas senutila! — emfazis en la sekva alparolo *Humphrey Tonkin*

Kiel kutime, multaj diplomatoj ĉeestis nian Kongreson. Respektinda nombro de ili — 19 diplomatoj — elpaŝis por persone saluti kaj transdoni mesaĝon de sia lando. La *belga* ambasadoro uzis sinsekve la francan kaj flandran por esprimi: «tial ni plene komprenas la servon de Esperanto!» La *ĉina* ambasadoro substrekis la intencon de sia registaro, doni ĉian apogon al Esperanto. La *Finnlanda* diplomato proponis, ke tria lingvo de internaciaj kongresoj estu Esperanto! Reprezentanto de *Kanado* invitis E-lingve al la 69a UK en Vankuvero; ricevis grandan aplaŭdon la *pola* ambasadoro kiu invitis la 100-jaran jubilean kongreson al Varsovio. Apartan simpation vekis la unua sekretario de la *Egipta ambasado* pro tute Esperant-lingva parolado. Ambasadanoj de *Aŭstrio* kaj *Norvegio* finis siajn bondezirojn ĝentile ankaŭ per E-aj frazoj. La malproksima kvina kontinento prezentis sin eminente per skribaj mesaĝoj: la ĉefministro de *Aŭstralio* invitis organizi UK-on en 1988 dum la landa jubilea jaro; la ĉefministro de *Novzelando* ankaŭ ĉi-jare aprobis perletere la celojn de la E-movado. La seriozecon de lia amika sinteno firmigis io nekutima, nome similaj mesaĝoj de prezidantoj de du gravaj opoziciaj partioj Novzelandaj.

Post la ŝtataj reprezentantoj *H. Tonkin* informis pri la multaj internaciaj organizoj, kiuj sendis reprezentanton por partopreni la Solenan Inaŭguron, resp. la Kongreson (multaj aliaj sendis skribajn salutojn).

## La salutparolo de Sándor Gáspár

Estimata Kongreso!

La sinjoro prezidanto estis afabla prezenti al vi ankaŭ min, kaj li denombris ankaŭ kelkajn miajn funkciojn, tamen ne ĉiujn. Mi mencias tion, ĉar mi volas saluti la Kongreson en la nomo de pluraj instancoj. Kaj se jam menciiĝis miaj pluraj funkcioj, mi rimarku, ke funkciojn mi havas ja plurajn, sed salajron nur unu.

En la nomo de la Prezidio de la Hungara Popolrespubliko, de la hungaraj sindikatoj, kaj de la loĝantaro kaj gvidantoj de la hungara ĉefurbo estime kaj kore mi salutas ĉiujn partoprenantojn de la 68a Universala Kongreso de Esperanto. Mi deziras al la Kongreso krean, rezultoplenan, bonan laboron!

Ni ne scias kun plena certeco, ĉu la lingva konfuzo ekzistas jam ekde la tempo de Babelo, sed estas fakto, ke nun ni estas disdividitaj ankaŭ el lingva vidpunkto. Tiu lingva disdivideteco certe havas siajn historiajn kaŭzojn. Kaj ni scias kun plena certeco, kiaj intenco kaj celo gvidis tiujn, kiuj antaŭ preskaŭ cent jaroj metis la fundamentojn de la Esperanta lingvo kaj movado. Niaj antaŭuloj havis la intencon — pri tio ni ne havas dubojn — per la kreo de komuna lingvo disponigi rimedon, eblon por tio, ke la homoj pli bone komprenu kaj estimu unu la alian. Niaj antaŭuloj deziris, ke ni faru komuna trezoro de la tuta homaro ĉiujn spiritajn valoraĵojn, kiuj akumuliĝis en nia mondo. Tiel do kiam ni parolas pri la Esperanto-movado, ni parolas pri unu el la plej noblaj, plej pur-intencaj movadoj de la lastaj jardekoj.

Ĉiun honestan, bonintencan homon entuziasmigas tio, se li vidas la rezultojn de sia laboro. La adeptoj kaj disvastigantoj de Esperanto jam povas vidi rezultojn de sia valora socia laboro. Tial denove mi deziras al vi bonan laboron, kaj sukcesan, bonan Kongreson.

Mi deziras, ke vi fartu bone en Budapeŝto, en Hungario, kie ni klopodis certigi ĉiujn kondiĉojn por la plenumo de via riĉa Kongresa programo.

Mi deziras bonan sanon kaj multajn sukcesojn al vi ĉiuj!

**La Alta Protektanto, Sándor Gáspár salutas la Kongreson (Foto de Z. Fejér)**

**R. E. Butler**
**Ĝenerala Sekretario de ITU**

# Monda Komunika Jaro kaj ŝlosiloj al komunikado

**Parolado en la Inaŭguro de la 68a Universala Kongreso de Esperanto**

Sinjoro prezidanto kaj gesinjoroj,

Estas plezuro por mi akcepti vian afablan inviton partopreni en la inaŭguro de la Universala Kongreso de Esperanto. Foje iu diris, ke komunikado estas la komenco de ĉia interkompreno. Tiu diraĵo bone povus esti devizo kaj por Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj por Internacia Telekomunika Unio (ITU).

Jam de sepdek kvin jaroj via Asocio senlace klopodas ampleksigi internacian komunikadon kaj interkomprenon, kaj interproksimigi la popolojn de la mondo per komuna lingvo.

Interkomunikado estas ŝlosila faktoro en la socia, ekonomia kaj kultura evoluo de la nacioj kaj por kompreno inter la popoloj. Kiel ofte lingvaj baroj kaŭzas miskomprenojn inter popoloj kaj nacioj — kaj tio okazas spite al senprecedenca teknologia evoluo kaj ties aplikado por tuja komunikado tra la mondo.

En tiu ĝenerala kunteksto, ambaŭ niajn organizaĵojn koncernas esencaj elementoj de la perilo pli ol la mesaĝo; vin, UEA, dum vi provas venki lingvajn barojn, por komuniki inter malsamaj nacioj kaj popoloj per la uzo de universala lingvo, nin, ITU, per teknologiaj rimedoj, por transsalti la distancojn kaj nuligi vojaĝtempon. La mondo de la komunikado estas akre konscia, ke nuraj teknikaj rimedoj ne donas efikan komunikadon. Devas troviĝi almenaŭ du homoj por ekkomuniko, kaj ni ĉiuj scias, ke se tiuj du homoj ne komprenas la parolojn unu de la alia, ne realiĝas komunikado.

Tio same veras por telekomunikaj sistemoj; la terminalaj ekipaĵoj, fabrikitaj de malsamaj landoj, devas, inter certaj limoj, havi la samajn karakterizaĵojn por povi kune funkcii. Alivorte, ili devas esti funkcie akordigeblaj. La samo validas en la kazo de transmisiaj retoj de ĉiu lando, kiuj sen grandskala normigo ne povus esti kunligitaj por formi la nuntempan tutmondan telekomunikan retaron.

Tio, fakte, estas la historio pri la origino de ITU. Kiam oni inventis la elektran telegrafon en la 1830-aj jaroj, oni tuj komprenis, ke ĝi estas tute nova dimensio de komunikado, kiu povas venki la problemojn de distanco kaj vojaĝtempo, ĝis tiam nesupereblajn.

La funkcio de ITU, jam de ĝia komenco kiel Internacia Telegrafa Unio en 1865, estis krei la kondiĉojn, kiuj ebligus internacian interkonekton de naciaj retoj. Estas grave substreki ĉi tion; ne temis pri la starigo de internacia reto kiel io aparta disde naciaj retoj, sed temis pri certigo, ke estu grado de komuneco inter la naciaj retoj, tiel ke ili povu esti relative facile interkonekteblaj.

Tiu koncepto aŭ gvida principo validas jam de la plej simpla telegrafa ekipaĵo, kiu ekzistis en 1865, ĝis la modernaj telekomunikaj sistemoj, kiujn oni konsideras por estonta enkonduko.

La problemo krome ne limiĝas al certigo de interakordebleco, sed oni devas ankaŭ teni komunikaĵojn apartaj, kie necesas. La invento de la radio-ricevilo kunportis la problemon de ĝena perturbado inter elsendejoj, kaj la fakto, ke radio-ondoj disvastiĝas laŭ la leĝoj de la fiziko kaj ne laŭ tiuj de la homo, tiel ke ili ne atentas homfaritajn landlimojn, kaŭzas ke ITU devas trakti la internacian planadon kaj kunordigon de la uzo de la radiofrekvenca spektro kaj per tio, certagrade, tiun de la uzo de la spaco kaj speciale de la terrilate senmova orbito.



**Richard E. Butler, ĝenerala sekretario de Internacia Telekomunika Unio (Foto de Z. Fejér)**

Tamen, spite al ĉiuj ĉi grandaj teknikaj atingoj, la mondo multrilate ankoraŭ neniel sukcesas provizi eĉ minimuman telekomunikan servon al granda parto de la tergloba loĝantaro.

Fakte, kiel provizi per eĉ la plej simpla telekomunikilo je promena distanco tre konsiderindan parton de la monda loĝantaro, tio prezentas unu el la plej grandaj telekomunikaj problemoj kaj defioj de nia tempo.

La telefono, inventita antaŭ pli ol cent jaroj, estas la ideala ilo. Ĝin povas uzi ĉiu, sed ĝi ankoraŭ ne multe influis la profunde kamparajn kaj forajn regionojn de la mondo. La kialo malantaŭ tio estas la kosto kaj certagrade la teknologio. Sed ni ne plu povas kulpigi tiujn faktorojn nun. La problemon oni povas solvi surbaze de kunlabora divido de rimedoj, sufiĉa prioritata investado kaj kunlabore norde-sude kiel ankaŭ interne de la sudo. Teknologio kaj kunlaboro ja povas tiel doni egalan aliron al komunikado por ĉiuj, kaj nun je malalta kosto.

En ITU mi rigardas la komunikadon kiel ilon por evoluigo, precipe socia kaj ekonomia. Ni povas, kompreneble, mezuri aŭ taksi ekonomian progreson rilate al la vivnivelo kaj -kondiĉoj, kaj tiel ni alvenas, al la komparo inter la «havuloj» kaj «malhavuloj» aŭ al tio, kio ofte nomiĝas la «evolu-breĉo».

La ciferoj klare parolas. En 1982 troviĝis proksimume 550 milionoj da telefonoj en la mondo kaj 600 milionoj da televidiloj. Proksimume 15 procentoj de la nacioj uzas 90 procentojn

**Parto de la rekorde granda aŭskultantaro: en la unuaj vicoj sidas la diplomatoj kun siaj interpretistoj (Foto de Z. Fejér)**

de ĉi tiuj telefonoj kaj televidiloj, dum 85 procentoj de la nacioj de la mondo devas elturniĝi kun la restantaj 10 procentoj. Ĉi-speca malekvilibro kondukis al tio, ke la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1983 Monda Komunika Jaro kun la temo «Evoluigo de komunikilaj substrukturoj». La bazaj celoj, deciditaj de la Ĝenerala Asembleo de UN, estas «doni la eblecon al ĉiuj landoj entrepreni profundan esploron kaj analizon de sia politiko pri la evoluigo de komunikado» kaj «faciligi akcelatan evoluigon de komunikilaj substrukturoj».

ITU estis nomita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kiel la gvida organizaĵo por la aktivado de Unuiĝintaj Nacioj kaj ties Specialaj Organizaĵoj rilate al la Jaro. La ĝenerala sekretario de ITU estas la kunordiganto de la Monda Komunika Jaro inter la UN-organizaĵaro. Unuiĝintaj Nacioj kaj la koncernaj specialaj organizaĵoj proksime kunlaboras kun ITU, por efektivigi vastan gamon da programoj, projektoj kaj agadoj por plenumi la celojn, deklaritajn de la Ĝenerala Asembleo de UN. Troviĝas apartaj roloj por Unesko kaj Universala Poŝta Unio kiel ankaŭ por koncernaj uzantoj kiel ekzemple: Monda Organizaĵo pri sano, Organizaĵo Internacia pri Civila Aviado, Monda Organizaĵo pri Meteologio kaj Nutraĵa kaj Agrokultura Organizaĵo. Aldone multaj neregistaraj Organizaĵoj proponis sian subtenon. Ĉi-loke mi aparte ŝatus varme bonvenigi la ambician programon de via Asocio, kiu fondos fakterminaron por komunika teknologio. Mi estas certa, ke tiu entrepreno havos sekvojn, kiuj longe superos la skribadon en Esperanto kaj esperantigon de tekstoj pri komunikado.

La Monda Komunika Jaro tamen ne estas nur agado, kiu okazas sur la nivelo de internaciaj organizaĵoj, sed ĝi intime koncernas tion, kio okazas sur la nacia nivelo, ĉar la celo estas finfine plibonigi la aliron al komunikado por la ordinara homo.

Unuopaj registaroj starigis 63 naciajn komitatojn por plenumi la programon de la Monda Komunika Jaro en la koncernaj landoj. En multaj landoj tiuj komitatoj nur por la unua fojo enkondukas kompleksan kaj praktikan kunordigon sur la kampo de komunikado. Mi esperas, ke la komitatoj estos antaŭuloj de konstantaj naciaj komitatoj por kunordigo.

65 ŝtatestroj akceptis aliĝi al Internacia Honora Komitato por doni sian patronecon kaj moralan subtenon al la celoj de la Jaro.

Ĉio ĉi tendencas al plenumo de la celo «Unu mondo, unu reto», kiu estis la celo ankaŭ de la ĉi-jara Monda Telekomunika Tago.

Tamen ni devas neniam pretervidi la malpli palpeblajn sed eble pli signifajn aspektojn de la komunikado.

La Internacia Komisiono por Studado de Komunikaj Problemoj, ofte konata kiel la Komisiono de MacBride (makbrajd), deklaris konklude (paĝo 258): «Evoluigaj strategioj devus enhavi komunikadan politikon kiel integran parton en la diagnozo de bezonoj kiel ankaŭ en la projektado kaj efektivigo de elektitaj prioritatoj. Ĉirilate la komunikadon oni devus trakti kiel ĉefan evoluigan rimedon...»

La komisionon de MacBride oni ne rigardu kiel rezulton, sed kiel komencon. Ĝiaj konkludoj montras, fakte, bazan zorgon, kiu estas unu fundamenta celo de Monda Komunika Jaro, nome Evoluigon de Komunikilaj Substrukturoj, kiu donas al ĉiu el ni, laboranta per naciaj komitatoj aŭ per la programoj de la koncernaj internaciaj organizaĵoj, eblecon partopreni en la evoluigo de la komunikilaj substrukturoj, tiel necesaj por la ekonomia, socia kaj kultura evoluo de la popoloj, kaj de ĉiuj ni – individue kaj kolektive.

Mi nun ŝatus diri ion pri la uzo de la lingvo. Mi havus du ĉefinteresojn pri la uzo de la lingvo: 1/ la lingvo kiel la laborrimedo de internacia organizaĵo kaj 2/ la lingvo kiel la komunika rimedo inter la korespondantoj en telekomunikaj sistemoj.

La lingvo estas necesa elemento en la komunikado. Kiel multe pli bona estus tergloba interkompreno, se ni havus unu solan lingvon!

En la pasintaj kelkaj jaroj ni bonŝance vidis, aparte en landoj kun adekvataj edukaj rimedoj, ampleksigon de la instruado kaj lernado de fremdaj lingvoj, kio estas laŭdinda klopodo de individuoj kaj certagrade de nacioj.

Sur la internacia nivelo ni vidas la ampleksigon de lingva kunlaboro per la pliigo de oficialaj kaj laboraj lingvoj, ekz. tiuj uzataj por certaj oficialaj publikaĵoj aŭ en konferenceja interpretado, la lingvoj, inter kiuj interpretistoj agas kiel perantoj en la dialogo kaj interkompreno ĉe apartaj kunvenoj de la internaciaj organizaĵoj kiel ITU. Kiel multe pli facile kaj malmultekoste estus, se ni havus nur unu solan komunan lingvon. Eĉ nun, kun la uzado de ses aŭ sep lingvoj, en variaj gradoj, en la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj ankoraŭ troviĝas multaj gravaj lingvaj grupoj, kiuj devas uzi fremdan lingvon por komuniki en konferencoj kaj kunvenoj. Jen la graveco de la laboro, kiel tiu de via Asocio, por progresigi komunan lingvon.

Troviĝas, kompreneble, ankaŭ la problemo pri la uzo de la lingvo en telekomunikado. La principo, ĝis nun aplikata, estas, ke kompreno inter la korespondantoj sur la lingva nivelo estis tute ĉi ties afero, kondiĉe ke la kvalito de la kunligo estis bona. Ĉu tio daŭre validos en la modernaj telekomunikaj sistemoj restas afero vidota.

Unu el la fruaj oficialaj rekonoj de Esperanto ja estis de la sama Internacia Telegrafia Unio, la antaŭula organizaĵo de la nuna ITU. Estas tre bela koincido, ke estis hungara propono, kiu rezultigis, ke la Internacia Telegrafia Konferenco, kunvenanta en Parizo, en 1925, akceptis Esperanton kiel t.n. «klaran» lingvon por la internacia publika telegrama servo.

Tio estis mejloŝtono kaj ĝi konservis la uzon de Esperanto por komunikado inter homoj, sed vi ĉiuj scias, ke ni nun vivas en mondo, kie lingvoj ekz. specialcelaj lingvoj, ofte bazitaj sur natura lingvo, estas uzataj por direkti maŝinojn. Tio estas temo, kiun vi ĉi tie diskutos dum la venontaj tagoj.

Multaj el tiuj lingvoj estas uzataj por apartaj celoj, kiel komputila programado, rego de ciferuzaj maŝinoj ktp. kaj la bezono de universala lingvo ĉirilata eble ankoraŭ ne sentiĝas. La pena serĉado por la ĝustaj vortoj kaj strukturoj, sub la neceso de eksperta kono de la kunteksto, verŝajne flankenigis okupiĝon pri skribado de la maŝine legeblaj instrukcioj en universala lingvo.

Sed tiu situacio validos nur tiel longe kiel la koncernaj taskoj estas rigardeblaj kiel fermitaj, apartaj operacioj. Kun voĉa rekonado kaj artefarita inteligento unuflanke kaj la uzo de publike alireblaj, komputile bazitaj, kaj aliaj informsistemoj en eksterlando per internacia telekomunikado aliflanke, venos tempo, kiam interparolado inter homoj kaj maŝinoj devos esti bazita sur pli universala kaj pli sisteme strukturita lingvo, ol la lingvoj, kiujn ni kutime uzas.

Vi komprenas, ke mi ne povas sugesti, ke tiun funkcion transprenu Esperanto, sed mi ja rekonas, ke Esperanto havas unikan pozicion inter la internaciaj lingvoj.

De la vidpunkto de universala uzo, estas du aspektoj, kie povus troviĝi eblaj lingvaj baroj al la uzo de novaj sistemoj. La unua estas povi paroli kun la sistemo, doni la ĝustajn instrukciojn kaj ricevi la deziratajn informojn. Tio implicas kaj povi trakti la informojn kaj povi rekoni, cele al elekto de la deziratajn informoj la plej taŭgan priskribilon por tiuj informoj.

La dua aspekto fakte rilatas al utiligo de la informoj el la komputa sistemo.

Estas facile imagi, ke la unua aspekto, la hom-maŝina dialogo, estas tiu, en kiu la lingva baro havos la plej grandan influon, ĉar efika dialogo signifaŝ tempouzan funkcion. Ĉi-rilate oni devas rekoni, ke multe oni povas fari per simboloj, sed simboloj sur ekrano ne sufiĉas. Kompleze al la uzantoj, tiaj sistemoj devus utiligi sufiĉe altnivelan lingvaĵon por la dialogo.

Oni tuj vidas eblan rolon por universala lingvo; sed oni devas esti realisma; tia sistemo bazita sole sur universala lingvo, verŝajne ne estus efektivigebla propono jam en la komenco. Tial eble necesus iri pluan paŝon per dulingva aliro.

Nun kiam la kosto de komputado malaltiĝas, leviĝas la demando, ĉu estus efektivigeble provizi tiajn informsistemojn per enkonstruita tradukfunkcio, tiel ke almenaŭ la serĉ-dialogo povu okazi aŭ en la lingvo de la gastiga lando aŭ en internacia lingvo.

Mi ne scias, ĝis kia grado vi jam pensas pri la uzo de Esperanto por hom-maŝinaj dialogoj en la novaj internaciaj komunikaj servoj.

Vi, tamen, estas la ekspertoj. Vi unuiĝis ĉi tie por konsideri la utilon kaj la teknikajn aspektojn de la uzado de Esperanto en la hodiaŭa mondo, kio implicas uzadon ankaŭ en la mondo de modernaj telekomunikado kaj komputiloj. Vi scias la potencialon, kaj mi supozas, ankaŭ la malfacilojn esence proprajn en la uzado de Esperanto en hom-maŝina kunteksto. Sed mi ja sentas, ke vi ĉiuj, via Asocio kaj la vasta anaro de esperantistoj tra la mondo povas fari tre konsiderindan kontribuon al la antaŭdiskuto de tio, kio sendube iĝos afero de konsiderinda intereso, se — kiel oni devas supozi, se oni kredas je teknika novigado — la hom-maŝina dialogo iĝos grava faktoro en la internacia komunikado kaj transsendado de informoj.

Mi ne rajtas fini ĉi tiun demandon sen diri kelkajn vortojn pri la hom-maŝina dialogo mem. Mi scias, ke multaj el vi, kaj verŝajne tute prave, sentos sin iom maltrankvilaj pri la ideo, ke promesplena aspekto de la estonta uzo de universala lingvo kuntrenus interparoladon kun maŝinoj. Tio ja ŝajnas iom nehoma. Oni devus, tamen, rigardi tiajn maŝinojn pli kiel rimedon, per kiu homoj povas delegi certajn funkciojn al aparato. Ju pli bona estas la teknologio, des pli la aparato povas fari kaj des pli praktika ĝi estos por ni. Spite al ĉio, ĝuste pri tio ni tendencas senti nin iom maltrankvilaj. Sed ni devas esti realismaj: kio eble ŝajnas stranga al unu generacio, tio eble ŝajnos tute normala kaj ĉiutaga al alia.

Sinjoro prezidanto kaj gesinjoroj, per ĉi tiuj pensoj, inspiritaj de la 21-a jarcento, mi ŝatus gratuli vin pro viaj atingoj kaj deziri al vi ĉian sukceson en viaj klopodoj estigi pli bonajn komunik-kapablojn, tiel neprajn por ni ĉiuj.

La konsiderinda nombro de partoprenantoj de via 68a Kongreso, kiu prezentas plian agrablan koincidon de Hungario, UEA kaj la Monda Komunika Jaro kaj sekve ankaŭ ITU, certe ebligos al vi rompi la provokan taskon, kiun vi difinis al vi.

Budapeŝto, 31a de julio 1983

# Malfermo

Dimanĉe posttagmeze grandnombra esperantistaro kunvenis por tiu malpli ceremonia, pli familiara festo. En la giganta halo, originale sportejo por internaciaj konkursoj – *nun salono Zamenhof* – agrable efikis la moderigita temperaturo (ekstere la termometro indikis 36 gradojn!), kaj nenio bremsis la ardan entuziasmon de la kongresanoj. Kaj ĝi iĝis altgrada tuj ĉe la komenco, kiam prezidanto *Maertens* prezentis la novan Estraron de TEJO. En urbo Debrecen la *39a Internacia Junulara Kongreso* ĵus elektis ilin, kaj multaj imagis dum tiuj minutoj, ke eble-probable inter ili staras estontaj gvidantoj de UEA...

La nunan Malfermon oni dediĉis ankaŭ por omaĝi al la *75-jara jubileo de UEA.* Tial atendis granda intereso, kiam *Renato Corsetti,* vicprezidanto de UEA, laŭtlegis leterojn de fakaj kaj aliaj asocioj – gratulis ankaŭ la grava ĉina organizo «Amikoj de Esperanto» –, krome la saluton de *Victor Sadler,* grandmerita eksa direktoro de UEA, nun loĝanta en Brazilo. Tondris la dankaj aplaŭdoj...

Laŭkutime sekvis la salutado flanke de landaj asocioj. Ne laŭ alfabeta ordo, ĉar *Stefan MacGill,* direktoro de la Centra Oficejo, laŭ iaspeca «ĉirkaŭtera vojaĝo» invitis ilin sprite kaj rapidtakte al la mikrofono. Plej unue el la kongreslando, helpantino de LKK, *Katalin Faragó,* ricevis la parolrajton: nome de la hungaraj esperantistoj ŝi salutis per nur kelkaj vortoj, rapideme, ĉar «necesas daŭrigi mian kongresan deĵoron...» – ne mirinde, ke eksplodis aplaŭdego.

Longa ĉeno de la landoj sekvis ŝin. Mankas loko por ĉiujn mencii, kvankam multaj reprezentantoj citis korvarmigajn sukcesojn, fiere mencieblajn progresojn sur pluraj kampoj. Videblis, ke nia movado vere ĉirkaŭprenas la terglobon. Kaj interalie oni aŭdis: en du klasoj de la bulgaraj mezlernejoj eblas lerni Esperanton... Pola Radio disaŭdigas ĉiutage dum 3 horoj E-lingve... (Estimata Leganto, ĉu vi utiligas foje ĝin? !) Ĉe Ĉina E-Ligo ekzameniĝis jam pli ol 30 miloj, ĝi lanĉis la deziron post tri jaroj organizi Universalan Kongreson...

Aŭstralia Esperanto-Asocio ripetis la inviton kongresi en 1988 sur tiu kontinento... kaj sekvis landoj de Afriko, de Mediteraneo... alviciĝis la Alpaj landoj... el Aŭstrio venis la voĉo ankaŭ de la Esperanto-Redakcio de Viena Radio. Oni pretiriris la bordojn de Atlantiko... ĝis la norda poluso, poste al Ameriko... La ĵus aliĝinta Kubo estis varme akceptita novulo... kaj fine alvenis la sekva kongreslando – *la 69a UK en Vankuvero!*

**Aktoro Kálmán Szabó prezentas poemon de William Auld, dediĉitan al la 75-jara UEA (Foto de Z. Fejér)**

Surprize pluvombrelo «ŝirmis« la mikrofonon, ankaŭ larĝa nacia ĉapelo surkape simbolis, ke Kanado amike kaj gastame protektos eĉ klimate la venontajn kongresanojn... kaj la publiko plezurplene akceptis la gaje invitantan salutparolon.

Post tiu serena-serioza fluga mondvojaĝo pere de la landaj asocioj, prezidanto *Maertens* staris al la oratora pupitro por festparoli pri la 75-jara jubileo, pri la fondo kaj la fondinto *Hector Hodler.* Emfazante la plej valorajn trajtojn en la historio de UEA, li rimarkigis, ke ĝi ankaŭ spegulas la socion de nia mondo. La prezidanto elokvente skizis la nuntempajn tendencojn de la jubileanta organizo: la *malfermitecon,* kiu ebligas al eminentaj gastoj renkontiĝi kaj diskuti kun esperantistoj; la *kombinon de metodoj*, de agoj desupre kaj desube, havi kontaktojn kun vasta publiko ankaŭ pere de amaskomunikiloj. Necese UEA devas multrilate ŝanĝi sin mem, ĝuste la spertoj de ĝia historio altrudas tion. Feliĉe, la nova Estraro povos ekpaŝi sur intertempe grave firmiĝinta organiza kaj financa bazo, kiu ebligos energie apliki kaj realigi fruktodonajn planojn. Tiuj planoj devos progresigi mondvaste nian movadon antaŭ la sojlo de la Jubilea Jaro! – finis *Grégoire Maertens* la festparoladon dum ŝtorma aplaŭdo de la halon plenigantaj kongresanoj.

Ervin *Fenyvesi*

**En la nomo de la hungaraj esperantistoj salutis la Kongreson Katalin Faragó (Foto de Z. Fejér)**

# Akcepto en la Parlamentejo

La 4-an de aŭgusto je la 18a horo István Sarlós, vicprezidanto de la ministro-prezidio (vic-ĉefministro), prezidanto de la Honora Komitato de la 68a UK, en la Parlamentejo akceptis 350 kongresanojn. Ĉeestis en la akcepto ankaŭ pluraj elstaraj reprezentantoj de la hungara publika vivo.

La akcepto okazis en la t.n. Ĉasista Salono de la bela konstruaĵo, kiun multaj kongresanoj admiris jam ankaŭ en kadro de ekskurso. S-ro István Sarlós salutis la gastojn per la jena parolado:

*Estimata Sinjoro Prezidanto, estimataj gastoj!*

*En la nomo de la Registaro de la Hungara Popolrespubliko mi salutas vin, reprezentantojn de la 68a UK de Esperanto. Ni nun estas en la Parlamentejo de la Hungara Popola Respubliko. Tre grava estas por ni tiu ĉi konstruaĵo; parte pro tio, ĉar ĝi estas unu el la plej belaj historiaj konstruaĵoj de Hungario kaj eĉ de Eŭropo. Kaj ankaŭ pro tio, ke krom la hungara Parlamento en tiu ĉi konstruaĵo funkcias la Prezidio de la Hungara Popolrespubliko, kiu plenumas la ŝtatestrajn taskojn, kaj en tiu ĉi konstruaĵo funkcias ankaŭ la Registaro. Tri gravaj instancoj rezidas en la Parlamentejo, sed tio ne nepre signifas, ke ni estas malriĉaj, kaj ne povus alie solvi tion. Tio signifas plie, ke ankaŭ fizike ni plifaciligas la kunlaboradon de la tri instancoj, kaj tiamaniere ni povas ebligi, ke la reprezentantoj de tiuj tri instancoj ofte kaj facile interŝanĝu opiniojn pri la laboro. Multajn aferojn simbolas tiu ĉi konstruaĵo, sed tion ĝi tamen ne povas atingi, ke gasto, kiu venas ĉi tien por unu aŭ du horoj, per tiu ĉi simbolo ekkonu la laboron de la tuta lando. Nia lando estas malgranda, sed ĝi havas grandan historian pasintecon, nia popolo havas gravajn virtojn, kaj ĝi havas ankaŭ grandajn perspektivajn planon kaj programon. Unu el niaj celoj estas varti bonan amikecon kun la popoloj de la mondo. En la signo de tiu ĉi amikeco ni volus laŭeble kun la plej multaj alilandaj homoj komunikiĝi, interŝanĝi pensojn kaj renkontiĝi. La hungara lingvo ne estas vicigebla inter la grandajn lingvojn de la mondo, sed ne ekzistas angulo en la mondo, kie ne vivas hungaroj. La tempestoj de la historio en la 20a jarcento kelkfoje ŝiris tiun ĉi popolon, kaj tiuj ventegoj portis homojn de ĉi tie al multaj anguloj de la mondo. Tial por povi kontaktiĝi kun homoj de aliaj popoloj, por ni estas tre grave, ke laŭeble plej multaj hungaraj civitanoj de aliaj landoj kiel eble plej ofte nin vizitas por konatiĝi kun nia popolo, kun ĝiaj historio kaj nuntempo. Internacia konferenco ĉiam prezentas eblojn por tio, ke komenciĝu io nova. De tiu eblo certe doniĝas, ke la gvidantoj de la hungara movado post tiu ĉi kongreso instigu ankaŭ aliajn ellerni Esperanton. Ofte mi aŭdis pri tio, ke inter la membroj de la internacia Esperanto-movado la kontaktoj estas multe pli striktaj ol ordinare inter homoj en la mondo. Tio manifestiĝas en reciproka helpo kaj kompreniĝo, kaj mi supozas, ke en la nuna momento la mondo bezonas tre multajn reciprokajn helpon kaj kompreniĝon. Kaj mi deziras por ni mem kaj por ĉiuj popoloj de la mondo, ke ankaŭ per la helpo de Esperantomovado ĝi ricevu kiel eble plej multe el tiu interkompreniĝo. Kaj mi deziras, ke en ĉiuj anguloj de la mondo sentiĝu tiu humanismo, kiun ankaŭ vi reprezentas.*

**La oficiala akcepto prezentis eblon ankaŭ por amika, neformala interparolo inter la prezidanto de la Honora Komitato kaj la gvidantoj de UEA. Sur nia bildo (de maldekstre): Flóra Szabó-Felső, Grégoire Maertens kaj István Sarlós**

**István Sarlós danke transprenas de Grégoire Maertens la libron „Hiroŝima-Nagasaki", kiu „pledas per bildoj por la amikeco." En la fono staras Yosimi Umeda (maldekstre) kaj Vilmos Benczik (meze)**

*Fine mi petas vin je la ĝoja okazo de la hodiaŭa renkontiĝo trinki kun mi glason da vino. Mi diris iom hezite tion, ĉar mi scias, ke inter esperantistoj troviĝas pluraj kontraŭalkoholistoj. Sed ju pli multe trinkas la kontraŭalkoholistoj, des pli malmulte restos por la alkoholistoj. Je via sano!*

Liajn vortojn respondis la prezidanto de UEA, s-ro Grégoire Maertens:

*Estimata Sinjoro Vicprezidanto de la Ministro-Prezidio!*

*Ni alte aprezas vian inviton al ĉi tiu Parlamentejo. La ĉeestantoj estas tamen nur delegitaro de la partoprenantoj ĉi tie, ĉar preskaŭ 5000 esperantistoj partoprenadas en ĉi tiu Budapeŝta kongreso. Ĝi do verŝajne estos la plej granda Universala Kongreso iam organizita de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi estas sukcesa kongreso, interalie pro la disponigitaj rimedoj de ĉiuj oficialaj instancoj en Hungario. Forte impresis nin la reprezentiĝo de la oficialaj instancoj ĉe nia inaŭguro, kaj en la sama momento dum tiu inaŭguro rigardis al ni la reprezentantoj de multaj ŝtatoj, multaj ĉeestantaj diplomatoj, inter ili sep ambasadoroj. Mi povas raporti al vi, ke la progreso de niaj laboroj ĉirkaŭ la ĉeftemo «komunikado» estas kontentiga. Multaj kongresanoj ĝuas ĉi tiun neogotikan Parlamentejon, kiu estas konstruita en la fino de la antaŭa jarcento. Vi parolis pri la amikeco inter la popoloj. Ĝuste pri tiu temo mi volas transdoni al vi libron, kiu pledas per bildoj por tiu amikeco.*

La libro, kiun la prezidanto de UEA donacis al la vicprezidanto de la hungara registaro, estis la luksa japana eldonaĵo *Hiroŝima-Nagasaki*, kies bildoj estas vera pruvo por tio, ke interkompreniĝo kaj reciproka bonvolo havas nenian alternativon.

Dum la kongresa semajno okazis ankaŭ aliaj akceptoj. Akceptis diversajn grupojn de kongresanoj la vicprezidanto de la hungara parlamento, la Nacia Konsilio de Hungaraj Virinoj, la Prezidantaro de la Patriota Popolfronto, la Hungara Packonsilantaro, la Nacia Konsilio de Hungaraj Kooperativoj. La Estraranojn de UEA akceptis s-ro József Timmer, sekretario de la Hungara Nacia Konsilio de Sindikatoj. Reprezentantoj de la Estraro estis akceptitaj ankaŭ de Zoltán Szépvölgyi, ĉefurbestro de Budapeŝto.

Tiu ĉi vico de akceptoj konvinke atestas pri la prestiĝo de Esperanto en la hungara socio – estas la devo de la hungara movado lerte profiti tiun ĉi prestiĝon por la plua disvastigo de la Internacia Lingvo.

# Jubilea kunveno de MEM

La 6-an de septembro 1953 en la Aŭstra urbo St. Pölten estis fondita Mondpaca Esperantista Movado, kiu dum la pasintaj tri jardekoj akiris por si gravan renomon en Esperantujo kaj en la monda pacmovado.

La agado de MEM koncentriĝas pri la intensigo kaj akcelo de porpaca laborado de esperantistoj. Tiu ĝia agado estis vere sukcesa: pri la sukceso atestas ankaŭ la prestiĝo, kiun MEM atingis en la internacia pacmovado: ĝiaj reprezentantoj estas daŭre invititaj al ĉiuj gravaj internaciaj konferencoj de la Monda Packonsilio; cetere, ekde la jaro 1971 la prezidanto kaj ekde 1977 ankaŭ la ĝenerala sekretario de MEM estas membro de la Monda Packonsilio. En la jaro 1980 MEM ricevis la Honormedalon de la Monda Packonsilio. Ĉio ĉi grave altigas ankaŭ la internacian prestiĝon de la Internacia Lingvo kaj de la Esperantomovado — tiamaniere la per-Esperanta pacagado montriĝas ankaŭ tre utila por-Esperanta laboro.

En tiu ĉi jaro MEM fariĝis 30-jara. Okaze de la jubileo aperis 44-paĝa interesa libreto, kiun povis ricevi ĉiuj partoprenintoj de la 68a UK, kaj speciale tiuj de la sukcesa pacrenkontiĝo, okazinta la 1-an de aŭgusto en la Kongresejo. Pli ol tricent esperantistoj partoprenis la jubilean aranĝon.

István Terényi, vicprezidanto de la Hungara Packonsilantaro per sincere varmaj vortoj salutis la renkontiĝon.

D-ro Károly Laukó, sekretario kaj konstanta reprezentanto de la Monda Packonsilio en Ĝenevo, estis gasto de la pacrenkontiĝo. Li esprimis la dankon de la Monda Packonsilio kaj tiun de la prezidanto, s-ro Romesh Chandra pro la invito.

S-ro Romesh Chandra — multe bedaŭrante, ke persone li ne povas ĉeesti — sendis leteron al la pacrenkontiĝo, kiun d-ro Károly Laukó laŭtlegis.

**S-ro Károly Laukó laŭtlegis por la kunveno la salutleteron de Romesh Chandra, prezidanto de la Monda Packonsilio**

*«Tre estimataj Geamikoj!*

*Mi salutas la partoprenantojn de la Budapeŝta renkontiĝo de Mondpaca Esperantista Movado, kaj mi deziras multe da sukceso por via laboro en la nomo de la Monda Packonsilio kaj de ĝiaj 141 pacmovadoj, kiuj ĉirkaŭprenas jam la tutan terglobon.*

*Ĉiam estas festo en la vivo de iu organizo, kiam ĝi rememoras pri signifaj datrevenoj, jubileoj. Tiel estas ankaŭ en la kazo de la 30-jara datreveno de MEM. Tiu ĉi okazo samtempe estas momento plena de respondeco. Ni devas retrorigardi al la vojo, al la laboroj ĝis nun faritaj, kaj ni devas decidi pri la taskoj en la futuro, kiuj neniam povas esti pli malmultaj ol la antaŭaj. Speciale ne nuntempe, kiam la homaro atingis la plej danĝeran etapon de sia historio. «Flanke de la homaro nur ununura paŝo al la malbona direkto kaj ĝi nereteneble falos en la abismon de la atommilito.» — emfazas la alvoko de pli ol 3000 partoprenantoj de la Monda Pacrenkontiĝo en Prago, analizante la taskojn de la luktado por la paco, por la vivo, kontraŭ la atommilito.*

*Multaj scias jam, ke la vetarmado, speciale la atomarmado atingis tiajn dimensiojn, de kie jam apenaŭ estas revenvojo. La planita lokigo de la usonaj raketoj en Eŭropo signifus tian spiralon de la armado, kies konsekvencoj ne plu estas videblaj. Kaj en ĉi tiu kazo oni devas konsideri la eblecon ne nur de la intenca, sed ankaŭ de la hazarda katastrofo.*

*Kies intereso estas ĉio ĉi? Kiuj*

**Imre Pethes, prezidanto de Mondpaca Esperanto-Movado, membro de la Monda Packonsilio, en sia parolado resumis la rezultojn de la 30-jara sukcesa agado por la paco kaj interkompreniĝo**

*profitas el ĉi tio? Kiuj respondecas pri tio ke en niaj tagoj unuavice la vetarmado estas kaŭzo de problemoj, kiuj montriĝas en la ekonomia kaj alidirekta evoluo de la homaro — speciale en la evolulandoj.*

*Ĉiam pli multaj rekonas la danĝeron de la nuklea milito kaj ĉi tio ekmovas amasojn, faras la agadon de la pacmovadoj pli energia — ja la homoj volas vivi kaj ĉiu volas pli bone vivi, pli inde je homo!*

*Mi estas konvinkita, ke nia komuna tasko estas konsciigi al ĉiuj la teruran danĝeron, klarigi al ĉiuj ke ne sufiĉas nur scii pri ĉi tio, sed ni devas ankaŭ agadi por la pli bona kaj inda vivo — kaj agadi kune!*

*Ĉu ekzistas pli eminenta ilo en niaj tagoj por ĉi tiu ne facila laboro ol la lingvo Esperanto, kiu plifaciligas la komunikadon, la internacian kompreniĝon — kiuj estas komenco de ĉia kunlaboro?*

*La Monda Packonsilio estas fiera pri tio, ke troviĝas esperantistoj en ĝiaj vicoj, kaj la kunlaboro inter niaj organizoj estas elstara. Ĝuste antaŭ dek jaroj ni konceptis la skribe fiksitajn principojn de nia kunlaboro.*

*Ĉiokaze mi aparte deziras diri dankon al d-ro Imre Pethes, prezidanto de via organizo pro lia agado en la intereso de pli striktaj kontaktoj inter Monda Packonsilio, Mondpaca Esperantista Movado kaj Universala Esperanto-Asocio.*

*La Monda Packonsilio bezonas Vian helpon kaj deziras apogi sin sur via laboro.*

*Ni faru ĉion kune por la paco, por la pluvivado de la homaro!*

*Romesh Chandra*
*Prezidanto de Monda Packonsilio»*

Post tiu ĉi entuziasmiga mesaĝo d-ro Imre Pethes festparolis, rememorante pri la 30-jara agado, rezultoj kaj taskoj, emfazante, ke MEM pretas kunlabori kun ĉiuj pacamikoj sendepende de iliaj nacieco, lingvo, vivkoncepto, religio, ĉar ankaŭ la atommilito ne distingos inter la homoj, sed estas komuna minaco kontraŭ la tuta homaro.

La prezidanto de la packunveno Clément Tholet ne havis facilan taskon, ĉar abundis la alparoloj, kiuj parte raportis pri la propralandaj pacmovadoj, parte alvokis por pli forta kunagado.

La varma, belega voĉo de la esperantista operkantistino Anna Kiss entuziasmige fermis la renkontiĝon, kiu restis neforgesebla travivaĵo por ĉiuj partoprenantoj.

**Parto de la partoprenantaro de la kunveno**

# Vesperoj en la Kongresejo

La vesperaj programoj en la Kongresejo mem havis elstaran gravecon por la kongresanoj, ja malgraŭ la paralelaj teatraj prezentadoj en la Kulturcentro «Pataky Istvan», la laco aŭ la komfortamo katenis la plimulton de la esperantistoj en la Kongresejo. La loko de tiuj programoj estis la Salono «Zamenhof» t.e. la granda areno de la Sporthalo, kun sidlokoj por 5500 spektantoj.

La unua vespero — la 30-an de julio — kompreneble estis la *Interkona Vespero,* kiu daŭris ĝis la 1-a horo nokte. Muzikon liveris al la grandnombra partoprenantaro la ensemblo «Polaris», kiu havis en sia repertuaro ankaŭ esperantlingvajn kantojn.

Por tiuj, kiuj ne deziris danci, je la 21-a horo komenciĝis interesa kvizo kun la titolo «Kion vi scias pri Hungario?» La kvizon gvidis Jozefo *Horváth* kaj Magda *Bruzsa,* kaj la ĉ. 300-persona publiko bone distriĝis tie dum plenaj du horoj. Montriĝis, ke pluraj kongresanoj havis elstare profundajn konojn pri Hungario; rikoltis abundajn aplaŭdojn per siaj konoj interalie s-ro Maurice *Sujet,* emerita direktoro de duagrada lernejo en Francio.

La 31-an de julio (dimanĉe) inter la 20a—22a okazis la *Nacia Vespero.*

Lunde (la 1-an de aŭgusto) ekde la 20a horo la Kongresejo estis malfermita por ĉiuj Budapeŝtanoj. En tiu ĉi vespero okazis *internacia konkurso de korusoj* el kvar landoj: Bulgario, Pollando, Sovetio kaj Hungario. La vespero bele demonstris, ke la Internacia Lingvo havas bonajn ŝancojn disvastiĝi ankaŭ en muzikaj medioj. La ĵurio — kiun prezidis la konata hungara komponisto András *Bágya* — ne povis decidi, kiu koruso atingis la plej altan nivelon: tial ĉiuj partoprenintaj

**Vera Dehler el GDR (Foto de Z. Fejér)**

**La Internacian Korusan Konkurson povis aŭskulti ne nur la kongresanoj, sed ankaŭ ĉiuj Budapeŝtaj kantamantoj (Foto de Z. Fejér)**





**La Internacia Korusa Konkurso kaj Internacia Arta Vespero bele demonstris, kiel riĉa estas nia movado je diversaj kulturaj ensembloj, el kiuj kelkaj eĉ pruviĝis veraj majstroj de sia ĝenro. Sur la bildo: Pola folklora ensemblo. (Foto de Z. Fejér)**

**Maria Angelova, kantistino el Bulgario (Foto de Z. Fejér)**

korusoj estis premiitaj. Kiel la reĝisoro kaj programanoncanto de la vespero, s-ino Éva *Farkas-Tatár* ĉe la fino rimarkis, la vera gajninto en tiu ĉi vespero estis la multnacia publiko.

*Internacia Arta Vespero* estis la kvara Kongreseja vespera programo, la 2-an de aŭgusto (marde), inter la 20a horo – kaj noktomezo. La iom tro ŝvelintan kaj longiĝintan programon enkondukis kaj anoncis kun heroa persisto s-ino Spomenka *Štimec,* kiu por tiu ĉi vespero ricevis iom fantazian perukon, kiun nia fotisto bedaŭrinde maltrafis. La programo de tiu ĉi vespero, kiel ĉiam, estis tre varia, – kompreneble, ankaŭ laŭ la nivelo. Jen specimene kelkaj pecoj, kiuj rikoltis grandajn aplaŭdojn: Veselin *Damjanov* (BG), Alberta *Casey* (Usono), muzika ensemblo el Litovio, kantotrupo el Armenio, Vera *Dehler* (GDR), pola folklora trupo ktp.

Merkredo estis ekskursa tago, tial LKK por merkredo enprogramigis *Junularan Vesperon,* prave supozante, ke la junularo eĉ post tuttaga ekskurso havas emon danci kaj distriĝi. Montriĝis tamen, ke ne nur gejunuloj havis emon por tio – fakte pli ol la duono de la kongresanaro estis en la kongresejo dum tiu ĉi vespero. Ankaŭ en tiu ĉi vespero muzikis la ensemblo «Polaris», sed la programo ne konsistis nur el muziko kaj dancado. La gejunuloj prezentis diversajn programojn, el kiuj unu – erotika travestio de unu el niaj movadaj kantoj – eĉ kaŭzis skandaleton.

Dum la ĵaŭda vespero okazis teatra prezentado en la Kongresejo: ĉ. 3000 kongresanoj spektis la teatraĵon «Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto? » de János *Elem.*

La *Kongresa Balo* vendrede vespere (fakte ĝis la kvara matene) estis ankaŭ adiaŭa vespero por la preskaŭ kvin mil kongresanoj. Muzikon liveris dum tiu ĉi vespero la Ensemblo «Pepsi Cola» de Kázmér *Kemény.* Enkadre de la balo okazis modparado aranĝita de la hungaraj firmaoj *OKISZ-Labor* kaj *Magazenoj Centrum.* Kantis dum la balo – ankaŭ Esperante – la hungaraj gekantistoj Teréz *Harangozó* kaj Attila *Horváth.*

Sep vesperaj programoj en la Kongresejo – oni povas diri, ke ili estis esence sukcesaj, ĉar, malgraŭ la forta konkurenckapablo de la vespera-nokta Budapeŝto, ili ĉiam altiris minimume la duonon de la kongresanaro.

# Pri la teatraĵ programoj

Ampleksan kaj valoran manuskripton flegas la eldona komisiono de HEA: tiun de Árpád Abonyi-Nagy pri la origino kaj historio de la teatraj aranĝoj en la Internacia Lingvo: Certe ne estis facile kolekti ĉiujn indikojn el la praaj tempoj... Dum tiu ĉi verko atendas aperigon, la 68a UK en Budapeŝto malfermis novan ĉapitron en la historio de Esperantaj teatroj. La kultura oferto de UK estis tiel abunda kaj riĉa, ke certe neniu el la kongresanoj spektis ĉiujn prezentadojn. Dum 5 tagoj okazis 11 prezentadoj de 10 spektakloj. La celo de nia kroniko estas informi la interesiĝantojn de la nuntempo kaj la estontajn kronikistojn pri tiu ĉi unika programaro.

## La teatrejo

La kulturcentro «Istvån Pataky» — nomita pri komunista junlaboristo, martiro de la batalo kontraŭ la faŝismo — ekde la jaro 1975 staras en servo de loĝantaro de la X-a distrikto Kobanya.

La nomo de la urboparto signifas «Ŝtonminejo», kaj kvankam minado de ŝtonoj jam ĉesis, la urboparto konservis sian industrian karakteron. Krom la konstanta nombro de loĝantaro (100 000) 30 000 laboristoj vojaĝas ĉi tien ĉiutage por labori — iliajn kulturajn bezonojn intencas kontentigi kaj evoluigi la kulturcentro Pataky sub la gvido de la direktoro, Lajos *Balogh.*

La moderna rondforma konstruaĵo el artefarita marmoro kaj vitro aspektas kvazaŭ astronomia observatorio, kaj en ĝi funkcias 23 fakrondoj, inter kiuj la plej juna kaj salutinda estas la novfondita Esperanto-klubo «Paco».

Regule okazas ĉi tie ankaŭ belartaj kaj diverstemaj ekspozicioj.

La Kulturcentro ne havas propran teatran trupon, tamen ĝia granda scenejo kaj teatra salono ne staras vakantaj: gastrolas ĉi tie trupoj de diversaj ĉefurbaj teatroj, ankaŭ ensembloj el diversaj landoj. «Pataky» jam delonge funkcias sub la signo de internaciismo, estas do nature, ke ĝi donis hejmon por teatraj aranĝoj de UK. Ĝia spektejo havas 476 sidlokojn.

## Renkontiĝo kun talentaj aktoroj

La Hungara Esperanto-Teatro kiu debutis sur Esperanto-scenejo antaŭnelonge, jam montris, ke ĝi povas serioze kontribui al la nuntempa Esperantokulturo. Post la prezentado de la teatraĵo «Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto? », la Esperanta publiko kun granda intereso atendis la sekvan programon de Hungara Esperanto-Teatro. Por la ĉijara Budapeŝta Printempa Festivalo kaj por la 68a UK, la hungaraj aktoroj elektis verkojn ne de hungaraj, sed de angla kaj usona aŭtoroj.

La monodramon de Beckett «La lasta magnetofonbendo de Krapp» prezentis elstare la hungara aktoro Kálmán Szabó. Post la paŭzo sekvis teatraĵo kompilita el «La Antologio de Spoon River» de E.L. Masters, sub la titolo «La mortintoj de Spoon River». La geaktoroj: Kati Berek, Emil Keres, Ildikó Pécsi, Denise Kárpáti, Lajos Cs. Németh kaj István Wohlmuth donacis belan travivaĵon al la ĉeestinta — ne tre grandnombra — publiko.

## Ŝajna senpasio

Teatro Esperanta de Parizo (TESPA) eble estas unu el la plej famaj teatroj de Esperantujo. Jam plurajn fojojn oni povis vidi ĝiajn prezentadojn en diversaj landoj kaj dum diversaj Espe-

**Kálmán Szabó en la rolo de Krapp (Foto de Z. Fejér)**



**Sceno el „Sen Eliro". De maldekstre: François Lo Jacomo, Sylvie Bonnet kaj Michel Audibert (Foto de Z. Fejér)**

ranto-aranĝoj. La repertuaro de la trupo estas bone kaj atente elektita; «La Justuloj» de A. Camus, «La kalva kantistino» de E. Ionesco, «La Fatomaŝino» de J. Cocteau.

Dum la ĉijara Kongreso en Budapeŝto TESPA prezentis la dramon «Sen eliro» de J.P. Sartre en la traduko de Roger Bernard.

Tiun ĉi dramon Sartre verkis en 1944 kaj per ĝi li volas pruvi la penson, ke «la infero estas la aliaj». En la infero, kiu fakte estas klasika salono, renkontiĝas tri personoj, Garcin — intelektema dizertino, Ines — murdema samseksemulino kaj Estelle — infanmurdintino.

Kvarcent spektantoj estis scivolaj pri la dramo de la mondkonata aŭtoro, kaj ili ne trompiĝis: TESPA ĉivespere ravis la publikon per sia ŝajne senpasia lud-stilo, kiun oni povus nomi eble «intelekte agresiva».

## Majstre — pri Majstro

S-ino Jadwiga Gibczyńska jam estas sufiĉe konata por esperantista publiko, ja ŝi ludis jam dum UK-oj en Budapeŝto, Tokio, Varno, Kopenhago, Lucerno, faris turneojn en Danlando, Svedio, Norvegio, Jugoslavio kaj en GDR.

Estas konataj ankaŭ ŝiaj pli fruaj sukcesoj: prezentadoj pri Marie Curie, «Post vizito», «Slavaj fabeloj» ktp.

La monodramo «Zamenhof» — kies aŭtoro estas mem la aktorino Jadwiga Gibczyńska, ja ŝi verkis ĝin ne laŭ jam publikigitaj biografioj, sed laŭ originalaj dokumentoj: korespondado de Zamenhofoj, ktp. — estis en la lastaj jaroj jam plurfoje prezentita, tamen Ginczyńska intertempe plupoluris, pluĉizis ĝin.

En la centro de la spektaklo staris Zamenhof, kiun Gibczyńska vidigis per okuloj de tri virinoj, proksime starantaj al li; per okuloj de la patrino, edzino kaj filino. Mirinde ŝi ludis kaj en la rolo de maljuna Rozalia, en tiu de juna kaj rave bela Klara, kaj en tiu de Lidia.

Ŝia dummomenta transformiĝo kaj por okuloj kaj por animoj estis sugeste impona. Grave kontribuis al ŝia sukceso la kantisto kaj komponisto Remigiusz Kossakowski, kies melodiojn kaj kantojn — laŭ la plej popularaj poemoj de Zamenhof — ĝuis ĉ. 200 nombra publiko, kiu ekstarante per longdaŭra aplaŭdo dankis pro la granda travivaĵo, revokante la aktorinon eĉ trifoje antaŭ la kurtenon.

S-ino Jadwiga Gibczyńska krom plenumo de teatraj prezentadoj ankaŭ instruas Esperanton, kaj lastatempe ŝi celis literaturon. Sendube ŝi debutis ankaŭ kiel talenta aŭtoro, tamen estus perdo por ni, se ŝi forlasus la scenejon.

Feliĉe la du agadsferoj estas akordigeblaj, kaj ŝi jam sin preparas por prezenti estonte teatraĵon «Signaloj» kiu enhavas fragmentojn el «Antaŭ juvelvendejo» — verko de K. Wojtyla — papo Johano Paŭlo la II-a.

Kuriozaĵon oni ĉiam volonte spektas, sed se ni atendas la prezentadon de «Signaloj», nia fido koncernas ne la popularan papon, sed la arton de s-ino Gibczynska, kiu jam vivas en la koro de esperantistoj.

## Garabonciások

La Arta Ensemblo «Garabonciások» el urbo Kecskemét ĉe sia fondiĝo certe ne pensis ankoraŭ pri prezentado por nehungaroj — ja ilia elektita nomo estas netradukebla kaj malfacile memorebla. Dum UK la Ensemblon reprezentis ĝia teatra trupo, nomata Studio «G». Konsiderante konsiston de la trupo (ili estas junlaboristoj kaj gestudentoj), kaj la cirkonstancojn, inter kiuj ili sin preparis, estas konstateble, ke tiu trupo entreprenis eble la plej multe, ja ĝi faris eĉ du prezentadojn.

Studio «G» estas eksperimentema teatro, ĝi volas sin esprimi ne simple per recito de dialogoj kaj per apliko de tradiciaj teatraj manieroj; ĝi klopodas je kompleksecо kaj serĉas la plej konvenajn scenejajn efikojn, eĉ, se rafinitajn. Modeloj de la reĝisoro János Beregszászi estas Grotowsky kaj Jancsó.

«La kastelo de l' Blubarba Princo» estis teatra renovigo. Tiun misteran ludon de Béla Balázs la trupo prezentis jam plurfoje en Esperanto. Krom la du ĉefrolantoj (Blubarbulo: János Beregszászi, Judita: Csilla Gudricza)

**Jadwiga Gibczyńska rikoltis grandan sukceson per la monodramo „Zamenhof" (Foto de Zoltán Fejér)**



**Sceno el „La Kastelo de l' Blubarba Princo", en la prezento de la trupo „Garabonciások" (Foto de Z. Fejér)**

rolis ankoraŭ sepo da geaktoroj, ili vivigis diversajn ĉambrojn de la kastelo. Sendube, el la vidpunkto de vidindaĵoj tiu ĉi prezentado estis la plej impona, kio dankeblas ankaŭ al la scenisto: Erzsébet Rátkai.

Pli granda interesiĝo montriĝis tamen pri ilia dua prezentado, pri la premiero de «Ni vivos». Estis jam printempo, kiam ili ricevis la manuskripton por lerni...

Ĉu kvar monatoj sufiĉos por sinpreparo? — La sukceso de la prezentado do pruvis, ke *jes*. «Ni vivos» estas dokumenta dramo pri la lastaj jaroj de Lidia Zamenhof, kiujn ŝi pasigis en la Varsovia getto. Maria Fekete plenumis sian rolon bonege, same eminente ludis Sofian Csilla Gudricza, la almozulon János Beregszászi — sed laŭdon meritas ĉiuj aliaj kunlaborantoj.

Legintoj de la libroforme jam aperinta dramo povis rimarki kelkajn negravajn ŝanĝojn, kiuj naskiĝis laŭ interkonsento kun la aŭtoro, kiu konsideris konsiston kaj specifecojn de Studio «G». La reĝisorado de János Beregszászi emfazis la sonĝeskajn aktojn de la teatraĵo.

Por multaj spektantoj estis surprizo, ke antaŭ kaj post la prezentado fine sin senmaskigis la aŭtoro; evidentiĝis, ke Julian Modest estas identa kun nia bulgara kunlaboranto: Georgi Mihalkov.

Spektis la prezentadon ankaŭ reprezentantoj de Bahaa Esperanta Ligo, inter ili ankaŭ s-ino R. Orloff Stone el Usono, kiu fine de la tridekaj jaroj persone amikiĝis kaj kunlaboris kun la protagonistino, Lidia Zamenhof. BEL-anoj post la prezentado vizitis kaj salutis la geaktorojn, respondis al ties demandoj.

La tradicia dramo feliĉe toleris la modernajn scenejajn manierojn kaj konceptojn de la reĝisoro kaj de la trupo, tiel la publiko povis ekkoni talentan dramverkiston kaj samtempe ĝui imponan teatran prezentadon.

**Sceno el „Epifanio", atuta ero de la teatra programaro (Foto de Z. Fejér)**

## Brila sukceso

Kiam Kiril Draĵev, la arta gvidanto de Bulgara Esperanto-teatro petis William Auld traduki la komedion de Shakespeare «Epifanion» por la Bulgara Esperanto-teatro, William Auld, deklarante sin preta fari la tradukon, respondis: «Labori por vivanta teatro estas vera plezuro.» Jes, BET estas la vivanta teatro de Esperantujo. Jam 25 jarojn tiu ĉi teatro aktive partoprenas en nia kultura vivo.

Estas malfacile listigi ĉiujn Universalajn Kongresojn dum kiuj ludis la bulgaraj Esperanto-aktoroj, tamen ilia unua prezento antaŭ la internacia publiko restos neforgesebla kaj memorinda. Ĝi okazis en 1959 dum la 44a UK en Varsovio antaŭ 3000 spektantoj. Tiam BET prezentis la komedion «Ĉasantoj de oficoj» de la klasika bulgara verkisto Ivan Vazov. Post tiu ĉi grandioza sukceso la teatro ludis dum la Kongresoj en Vieno, Londono, Hamburgo, Kopenhago, Ateno, Varno. Ĝia repertuaro ampleksas verkojn de bulgaraj kaj mondkonataj klasikaj aŭtoroj: Vazov, Kostov, Javorov, Shakespeare, Molière, Ibsen, Dürrenmatt k.a.

Dum la ĉijara UK en Budapeŝto, BET prezentis la komedion de Shakespeare «Epifanio aŭ Kiel vi volas». Ludi Shakespeare-verkon Esperante ne estas senriska entrepreno, ja ne ekzistas teatro en la mondo en kies repertuaro mankas la nomo de la genia dramverkisto, tamen la bulgaraj geaktoroj prezentis originalan, altnivelan spektaklon.

La reĝisorino Sofia Karakaŝeva estis fidela al la stilo de Shakespeare, kaj evitante la memcelajn eksperimentojn, la superfluajn efektojn, ŝi sukcesis krei tradician teatran spektaklon, en la plej bona senco de tiu ĉi nocio.

Kiel en ĉiuj komedioj el la epoko de la Renesanco, ankaŭ en tiu ĉi komedio de Shakespeare, la komikaj situacioj fontas el la hazardaj miskomprenoj. Viola alvestiĝas kiel junulo kaj prezentas sin sub la nomo Cezario. La duko Orsino amas Olivian, kiu amas Cezarion (=Violan), kiu amas Orsinon. La intendanto Malvoljo miskomprenas, ke li estas amata de Olivia. Sir Andreo miskomprenas, ke li estas minacata de Cezario (=Viola),

kaj tiuj ĉi miskomprenoj, sintrompoj naskas la ridon kaj gajecon. Shakespeare talente senvualigas la homajn malvirtojn: la memplaĉon, la timemon, la malicon, sed en la komedio regas ankaŭ la renesanca vivĝojo, la gajeco, kaj la geaktoroj sukcese interpretis la spritecon de Shakespeare.

La komika duopo Georgi Kiŝkilov, en la rolo de Sir Tobi, kaj Nikola Stefanov, en la rolo de Sir Andreo, ravis la publikon per sia talento individue kolorigi la komikajn situaciojn. Teo Jurukov, kiu jam delonge ludas en BET kaj estas bone konata al la Esperanto-publiko, majstre interpretis la memplaĉan kaj senhumuran intendanton Malvoljon. Vigleco, gajeco kaj petolemo karakterizis la ludadon de Rumjana Gajtanĝieva en la rolo de Maria. Per saĝa humuro kaj filozofiemo ludas Valentin Ganev en la rolo de Pajaco. Valentin Ganev, kiu estas ankaŭ la muzika aranĝanto de la spektaklo, kreis konvenan muzikan fonon por la komedio. Malgraŭ la epizoda rolo elstaris la ludado de Petar Vuĉkov, aktoro ankaŭ bone konata al la Esperanto-publiko. Tamen plej imprese ludis la ĉefrolantino Diana Najdenova, en la rolo de Cezario (=Viola). El ŝia interpreto radiis la vivĝoja etoso de la Renesanco. Per sia juneco, ĉarmo, delikateco ŝi ravis la spektantojn. Najdenova unuan fojon ludas en la trupo de BET, ĉar ĵus ŝi finis la Bulgaran Teatran Altlernejon, sed ni esperas, ke ankaŭ estonte D. Najdenova restos fidela al BET.

Per la prezentado de «Epifanio» la geaktoroj de BET ankoraŭfoje pruvis, ke Shakespeare-verkon oni povas ludi sukcese ankaŭ esperantlingve. La majstra traduko de William Auld estis talente interpretita de la bulgaraj geaktoroj, kiuj senriproĉe regis la Internacian Lingvon. Specialajn gratulojn meritas la arta gvidanto de BET, Kiril Draĵev, kiu jam 25 jarojn talente kaj senlace gvidas tiun ĉi prestiĝan Esperanto-teatron.

«Epifanio» estis prezentita la 2-an kaj 3-an de aŭgusto en la kulturcentro «Pataky». La 2-an de aŭgusto la prezentadon spektis ankaŭ la bulgara kultura ataŝeo en Budapeŝto, Lilo Toŝev. La duan prezentadon ĝuis pli multnombra publiko, sed estas bedaŭrinde, ke ne ĉiuj kongresanoj sukcesis vidi tiun ĉi altnivelan spektaklon.

(Daŭrigota)

# Gabi Jobba (1947—1983)

**Ni multaj vidis ŝin morti sur la scenejo. En la rolo de Rita Osjanina, juna vidvino de mortfalinta soldato, kiu firme daŭrigas la batalon de la mortinta edzo por la sankta celo — la libera patrujo. Sed ankaŭ ŝin trafas malamika kuglo, kaj ĝi faras nesanigeblan vundon. Rita tiam prenas la revolveron — kaj metas la finan punkton.**

**La vivo ripetis la korŝiran scenon de „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj". Gabi Jobba la 27-an de aŭgusto mortis.**

**Sur la Esperanta scenejo ŝi aperis dufoje: pasintjare en „La aŭroroj ĉi tie estas silentaj" kaj ĉijare en la solprogramo „Mi volis nur utili, kaj ne brili", Petőfi-recitalo, kiun ŝi mem kompilis. Tiun ĉi programon ŝi volis prezenti ĉi-somere dum la IJK kaj UK, sed anstataŭ ŝi venis al la kongresejo nur pardonpeta telegramo: „Mi estas tre malsana, mi devas nepre enhospitaliĝi, mi tre bedaŭras ne povi prezentiĝi antaŭ la kongresanoj — ja tiom mi atendis tiun eblon. Pardonu min, mi petas."**

**Ni, kelkaj, al kiuj la sorto donacis la eblon labori kun ŝi ĉe la antaŭpreparo de la du spektakloj, ni sciis, ke tiu telegramo signifas gravan malsanon. Ni konis ŝiajn persistemon, fanatikan strebadon al la perfekteco, manian labordisciplinon kaj enorman laborkapablon. Sed ni ne konjektis, ke la fino estas je nur apenaŭ monata distanco.**

**Ŝia ligiteco al Esperanto estis serioza kaj funda. Ŝin ravis ne unuavice la lingvo, sed ĉefe la sindediĉiteco de ĝiaj adeptoj. Ŝi sentis korproksima al si ĝuste tion, ja ankaŭ en ŝi vivis senkompromisa kaj senlima sindediĉiteco al ĉio, kion ŝi amis. Ŝi estis elstara aktorino, tamen antaŭ ĉio — modela homo.**

**Ni perdis ŝin por ĉiam. Restas por ni nur la sonmaterialo de „La aŭroroj..." kaj la Petőfi-recitalo — feliĉe — sur videokasedo. Kaj restas la vaka manko de tio, kion ŝi povus fari por la Esperanta teatro, kaj kion ne plu ŝi faros.**

**Ŝi vivis celkonscie, ĉiam precize sciante, kion ŝi volas. Kaj ŝi tiel ankaŭ mortis.**

**Vilmos Benczik**

# La nova Estraro de UEA

La 68a UK estis por UEA ne nur 75-jara jubileo, sed ĝi prezentis al la Komitato ankaŭ tre vivan taskon: finiĝis la mandato de la gvidaj organoj, elektitaj dum la 65a UK en Stokholmo, do, necesis reelekti ilin.

Unue «rekreis» sin la Komitato mem: la komitatanoj «A» (delegitaj de la landaj kaj fakaj asocioj) kaj komitatanoj «B» (reprezentantoj de la individua membraro) elektis komitatanojn «C» el la rondo de internacie konataj esperantistoj, kies spertojn la Komitato antaŭvidas utiligi por la celoj de la Asocio.

La Komitato elektis ankaŭ la diversajn komisiitojn kaj komisionojn por diversaj agadoj, kiel *kulturo, edukado, eksteraj rilatoj, scienca kaj faka aplikado de Esperanto, financoj kaj administrado, informado, landa agado ktp.*

Estis elektita ankaŭ la nova Estraro de UEA, kun la jena konsisto:

**Prezidanto: MAERTENS Grégoire**
**Vicprezidantoj: TONKIN Humphrey kaj UMEDA Yosimi**
**Ĝenerala sekretario: SZABÓ-FELSŐ Flóra**
**Alfabeta listo de la estraranoj kaj iliaj taskoj:**
**CORSETTI Renato: landa agado; planado**
**DESPINEY Barbara: junularo; parto de la eksteraj rilatoj**
**LINDBLOM Roland: kongresoj**
**MAERTENS Grégoire: financoj kaj administrado**
**RAGNARSSON Baldur: kulturo kaj edukado**
**TODOROV Petar: faka agado**
**TONKIN Humphrey: parto de la eksteraj rilatoj**
**UMEDA Yosimi: informado.**

**Kunsido de la Komitato (Foto de Z. Fejér)**

**La laboron de la Komitato jam gvidas la nova Estraro, kiu samtempe prezentas evoluon kaj stabilecon (Foto de Z. Fejér)**

Kiel oni povas konstati, okazis kelkaj ŝanĝoj. Eliza *Kehlet* kaj Ursula *Grattapaglia* ne estis reelektitaj, kaj eniris tri novaj nomoj en la Estraron: Barbara *Despiney* (Francio), Roland *Lindblom* (Svedio) kaj Yosimi *Umeda* (Japanio). Tio signifas, ke la Estraro nun havas naŭ membrojn anstataŭ la pli fruaj ok. Okazis ŝanĝoj ankaŭ ĉe la vicprezidantoj: en la antaŭa Estraro tiujn postenojn havis Renato *Corsetti* (Italio) kaj Baldur *Ragnarsson* (Islando), nun elektiĝis vicprezidantoj Humphrey *Tonkin* (Usono) kaj Yosimi *Umeda* (Japanio).

Kiel la supra listo montras, en UEA harmonie kunvivas ŝanĝoj kaj stabileco, kiuj nur kune kapablas certigi la normalan funkciadon de ajna organizaĵo. Post *kvar* jaroj Esperanto fariĝos 100-jara: la nuna Estraro oficos *tri* jarojn – la inda antaŭpreparo de la jubileo estos do praktike ĝia tasko. Ni esperu, ke ĝi havos la necesajn forton kaj persiston por tio – kun la helpo de la *tuta* membraro.

Estas ĝojiga fakto, ke dum la 68a UK plu universaliĝis Universala Esperanto-Asocio. En sia kunsido de la 2a de aŭgusto la Komitato akceptis la aliĝpeton de Kuba Esperanto-Asocio (KEA). Tiel nun la nombro de la landaj asocioj de UEA estas 45.

# KONGRESA PANORAMO

Dekstre: La poŝtmarko, eldonita okaze de la 68a UK.

Malsupre: Baldur Ragnarsson, prezidanto de la juĝkomisiono de Belartaj Konkursoj transdonas la diplomon al Bernard Golden, ĉi-jara gajninto de la Premio «Minnaja», atribuata por la plej bona eseo. Dekstre staras Aldo de' Giorgi

# KONGRESA PANORAMO

La hungara lingvo ne estas facila, tamen multaj volis gustumi ĝin iom. Jen, kelkaj partoprenintoj de «La hungara eksprese», kun la instruisto Jozefo Horváth

Aliaj kongresanoj montris interesiĝon ne nur pri la hungara lingvo, sed pri Hungario entute. Pluraj centoj partoprenis en la distra kvizo «Kion vi scias pri Hungario?»

La 31an de julio en la Urba Parko okazis renkontiĝo de la kongresanoj kaj la Budapeŝtanoj, kun riĉa kultura programo

Estas agrable babili sidante sur herbo...

# KONGRESA PANORAMO

Dum la renkontiĝo en la Urba Parko okazis ankaŭ debato pri la lingvaj problemoj kaj Esperanto, kun partopreno de ĵurnalistoj kaj eksterlandaj esperantistoj

La Ekumena Diservo en la Baziliko altiris multajn homojn

Kunsido de la Kristana Esperantista Ligo Internacia

Kvizo pri UEA, okaze de la 75a datreveno: ĝin gajnis la hungara teamo. Kvizestro: Brian Moon



# KONGRESA PANORAMO

Maldekstre: Diccon Mastermann, la Konstanta Kongresa Sekretario de UEA kun enigme ŝveba rideto sur la vizaĝo. Ĉu tiu rideto esprimas kontentecon pri la jam farita aŭ antaŭĝojon pri la farota laboro? Ĉu eble nur simple lacon? (Fotoj de Z. Fejér)

Malsupre: Esperantaj flagoj heroldis pri la UK sur la ĉefaj avenuoj de Budapeŝto. Ĉi tie jen la avenuo Rákóczi, la malgranda strateto dekstre estas strato Kenyérmező, kie troviĝas la sidejo de HEA.

# Hungara bukedo por la Kongreso

Multaj kongresanoj vizitas la kongresurbon, ne nur por aktive partopreni en la Kongreso, sed ankaŭ por ekkoni la landon, la popolon, kiu gastigas la Kongreson. La kongresanoj deziras konatiĝi kun la kulturo kaj arto de la koncerna lando, kun la tradicioj, folkloro, eĉ kun la lingvo. Tio estas ne nura turisma scivolemo, sed sincera deziro proksimiĝi al la lando kaj ĝia popolo, kaj Esperanto donas belegan eblecon por realigo de tiu ĉi deziro. Pere de la Internacia Lingvo, la fremdlandaj esperantistoj povas eksenti la specifon de la nacia literaturo, povas aŭdi popolkantojn en Esperanto-traduko...

Ne hazarde la naciaj vesperoj estas la unua programero en la kulturaj programoj de la Universalaj Kongresoj. Ankaŭ ĉijare en Budapeŝto okazis tiel.

La hungara Nacia Vespero okazis la 31-an de julio je la 20a horo, en salono Zamenhof, antaŭ 4000 spektantoj. La intereso estis vere granda kaj la publiko ne trompiĝis pri siaj esperoj.

Nun, kiam mi restarigas miajn impresojn el la hungara nacia vespero, mi konstatas, ke ĝi estis kiel granda bukedo, kies florojn oni kolektis de la vasta hungara ebenaĵo, de la montaro Mátra, de la bordoj de Danubo, Tibisko kaj Balatono.

La arta redaktorino de la programo, Éva *Farkas-Tatár* kolektis tiujn poemojn, kantojn, dancojn, kiuj plej elokvente karakterizas la hungaran literaturon, muzikon kaj dancarton.

La unua poemo, kiu eksonis en la salono, estis la poemo «Ĉe Danubo» de Attila *József* en traduko de Kálmán *Kalocsay*. Imprese Kálmán *Szabó* recitis tiun ĉi belegan poemon, kaj ĉiuj kongresanoj profunde eksentis, kion signifas Danubo por la hungara popolo:

*«Paseo, nuno kaj futur' kuniĝas*
*en ondoj de Danub' interbrakumaj.»*

La konata Esperanto-aktorino Kati *Berek* recitis poemojn de alia granda filo de la hungara popolo – Sándor *Petőfi*. La operkantistino Anna *Kiss* ravis la publikon per bukedo de popolkaj florkantoj. En la programo ne mankis ankaŭ la nomoj de la plej



**Kati Berek prezentas Karinthy-novelon**

elstaraj hungaraj komponistoj Ferenc *Erkel* kaj Zoltán *Kodály*. Anna Kiss kaj Gábor *Németh* prezentis dueton el la popola opero «Háry János» de Zoltán Kodály. Gábor Németh kantis «Vinkanton» el la opero «Bánk bán» de Ferenc Erkel, kaj «Fraŭlo-kanton» el «Székelyfonó» de Zoltán Kodály. Kati Berek prezentis la ĉarman novelon de Frigyes *Karinthy* «Mi amas la bestojn».

Ege interesaj kaj gajaj estis la scenoj de pupoj, prezentitaj de la pupaktorino Györgyi *Blasek*. Post la paŭzo la Popoldanca Ensemblo «Bem» de la Laborista Konsuma Kooperativo de Norda Buda amuzis la publikon per siaj viglaj popoldancoj. Tiu ĉi estis spektaklo ne nur por la okuloj, sed ankaŭ por la animo. Sur la scenejo eksonis la vigla hungara popolmuziko kaj ekfloris la belegaj buntaj popolkostumoj.

La kongresanoj longe memoros tiun ĉi riĉan nacian programon, per kiu la hungaraj esperantistoj tutkore bonvenigis ilin en la hungara ĉefurbo.

Georgi *Mihalkov*

**La Popoldanca Ensemblo „Bem"**

# La 20-a Internacia Infana Kongreseto

Ĝi okazis, kiel regule dum la UK, ĉijare en Budapeŝto. La kongresejeto situas en la Buda-a flanko de Danubo, en la urboparto Rózsadomb (Rozmonteto). La domo estas iama princa kastelo, nuntempe funkcianta kiel internulejo.

40 geknaboj el 10 landoj partoprenis en la Infana Kongreseto (IK), ilin prizorgis kaj edukis 10-persona kunlaborantaro el 6 landoj. La organizanto estis Zsuzsa *Barcsay* (H), gvidantoj Zsuzsa kaj Ernő *Csiszár* (H); kunlaborantoj: Marie *Grela* (B), Christopher *Fettes* (Irl.), Barbara *Pochanke* (PL), József *Horváth* (H-Győr), Ines *Frank* kaj Brigitte *Frank-Böhringer* (FRG) kaj Kalina *Vasiljevna* (BG), krome kelkaj porokazaj helpantoj.

Plejparto de la geknaboj jam konis unu la alian de pli fruaj kongresetoj kaj aliaj porinfanaj kaj porfamiliaj aranĝaĵoj, sed ankaŭ la novuloj rapide interamikiĝis en la agrabla internacia etoso. Ĉiu infano bone parolis Esperanton, ne nur tiuj, kiuj denaske estas edukitaj je E-o, sed ankaŭ tiuj, kiuj en lernejo lernas la Internacian Lingvon. Kelkaj infanoj la unuan fojon ĉi tie ekhavis kuraĝon paroli aktive E-on.

Varian programon ĝuis la kongresetanoj: ili vizitis la ĉirkaŭaĵon de la Reĝa Palaco, la Urban Parkon, plaĝon sur la Margarita insulo, la Budapeŝtan Planetarion kun E-lingva programo, spektaklon «Johano la Brava» de la Hungara Ŝtata Pupteatro, veturadon per la dentorada- kaj la Pionira fervojo al la Tendaro en Csillebérc, kie ili estis gastigitaj fare de la Internacia Infana Tendaro (98 geknaboj plus 20 gvidantoj el 6 landoj!), ili ekskursis per ŝipo al la urbeto Szentendre, kelkaj el ili partoprenis la Ekumenan Diservon en la Baziliko.

Ili ne enuis ankaŭ en la kongresejeto: belan interkonatiĝan kaj gajan adiaŭan vesperojn ili havis, krome desegno-konkurson, ĉiumatenan gimnastikadon, s-ino Grela instruis diversajn popoldancojn kaj s-ino Frank-Böhringer diversnaciajn kantojn, kiujn ili sukcese prezentis kun aliaj programeroj en la UK-ejo al siaj gepatroj kaj multnombraj kongresanoj.

En la kongresejeto vizitis ilin interalie tri interesaj gastoj. Elizabeta *Szabó-Regőczi*, pupteatra aktorino de la Hungara Televido kaj magiisto Árpád *Szegedi* prezentis programon al niaj geknaboj je ilia granda plaĉo.

Niaopinie la kongreseto bone plenumis sian taskon, fiksitan en la kongresa regularo:

*«La Internacia Infana Kongreseto estas edukejo, kie la infanoj spertas en etoso de festa sed disciplinita libereco internacian vivon kaj solidarecon sen iaj ajn rasaj, naciaj, religiaj aŭ aliaj apartigoj. Ĝi celas kuraĝigi familiojn kaj instruistojn instrui Esperanton al la infanoj; krei kontakton inter diverslandaj gejunuloj, kiuj jam scias la lingvon; montri al la publiko la servojn de Esperanto por pli bona internacia interkompreno.»*

Mi deziras substreki ĉi lastan frazon: «...kuraĝigi familiojn kaj instruistojn...» Se vi aŭdis la kongresetanojn ludi, babili, kvereli inter si en E-o, vi certe ekhavis emon kaj kuraĝon eduki je E-o viajn gefilojn, genepojn.

Nóra Csíszár, 10-jara kongresetanino en sia salutparoleto diris en la Inaŭguro de la 68a UK antaŭ kvinmil kongresanoj: «Estonte kunprenu viajn gefilojn, parolantajn en Esperanto, ĉar en la Infana Kongreseto ni estas tre malmultaj, kompare al vi!»

Akceptu ŝian (kaj nian) proponon!

Zsuzsa *Barcsay*

**La partoprenantoj de la 20a Internacia Infana Kongreseto salutas la kongresanojn en la Solena Inaŭguro (Foto de Z. Fejér)**

# La ferma kunsido

Certe troviĝis kelkaj, kiuj pli libere ekspiris je la fino de la lacigaj kongreslaboroj. Pri ties amplekseco oni ja ekhavis ideon dum la sabata ferma kunsido, aŭskultante skizan resumadon fare de *Flóra Szabó-Felső,* ĝenerala sekretario de UEA. Grandan respekton akiris nia movado per la partopreno de renomaj eksteraj fakuloj — ŝi konstatis. Eksterordinare amplekse okupiĝis pri la kongreso ĉiuj hungaraj amaskomunikiloj, kiuj prave citis la eldiron de la Alta Protektanto, *S. Gáspár:* «unu el la plej noblaj kaj plej puraj movadoj!»

Okazis grandega aro da programeroj: 200 oficialaj kaj ne kalkuleblaj alispecaj! Mem la *Komitato* de UEA (jam antaŭ la Inaŭguro) laboris dum 11 plenkunsidoj entute 16 horojn — krome ankaŭ la Estraro. Ili decidis pri sufiĉe multaj aferoj: oni elektis novajn komitatanojn «C» kaj *elektis novan Estraron* (por tri jaroj); estis akceptita *Kuba Esperanto-Asocio,* la 45-a aliĝinta landa asocio de UEA. Kvinjaran laborplanon akceptis la Komitato, kaj decidis pri multaj gravaj detaloj tiurilate.

Favora fenomeno estis la sukceso kaj ampleksa vizitateco de la fakaj kunvenoj. Fondiĝis novaj asocioj (de verkistoj kaj filozofoj). *Esperantologia Konferenco* denove havis grandan sukceson (precipe la prelego de *prof. Szerdahelyi*), same pluraj prelegoj de la *Kongresa Universitato.* La salonoj ofte ne sufiĉis por la aŭskultantaro.

*La kulturan intereson* certagrade montras, ke oni vendis 3 mil teatrajn biletojn (kvankam poste ne ĉiuj foruziĝis!). La libroservo sukcese vendis de pli ol duon-miliono da forintoj (ties 60 procentoj enspeziĝis por libroj). La *Kongresa Budapeŝta Informilo* aperis ĉiutage, publikigante multajn informojn, kaj listojn de la laste aliĝintaj kongresanoj.

Rekorda nombro partoprenis la multajn *ekskursojn:* oni aĉetis preskaŭ 7 mil biletojn, ja Budapeŝto kaj la lando forte allogis por ekskursi. La *Infana Kongreseto* (jam la 20a) kunigis 40 infanojn, venintajn el 14 landoj. En arbara tendaro kunloĝis aliaj 90 infanoj diversnaciaj, kiuj bone aplikis nian lingvon por interamikiĝi.

Prezidanto Maertens anoncis, ke *Ingemund Bengtsson,* prezidanto de la sveda parlamento (vicprezidanto de la Socialdemokrata Partio) iĝis membro de la Honora Patrona Komitato pro sia aktiva subtena agado; novaj Honoraj Membroj ricevis tiun titolon



**Flóra Szabó-Felső resumas la kongresajn laborojn (Foto de Z. Fejér)**

**S-ro Du Temple (dekstre) prezidanto de LKK de la 69a UK transprenas la simbolan kongresan flagon el la manoj de la Budapeŝta kolego, Endre Baráth (Foto de Z. Fejér)**

de UEA: *d-ro István Szerdahelyi* (Hungario), *E.J. Woessink* (Nederlando), *Francisco Almada de Souza* (Brazilo) kaj *M.Saheb-Zamani* (Irano) Granda amika entuziasmo longe akompanis ilin al la podio, kie ili sidiĝis apud la estraranoj.

La *Pokalo Fyne* apartenis ĝis nun al Hungara Esperanto-Asocio (ĉiun duan jaron oni aljuĝas ĝin al la plej bone laboranta landa asocio). Dum forta ovacio nun la Ĉina Esperanto-Asocio ricevis la pokalon pro rapida kreskado kaj efika agado. La belan pokalon transprenis Zhang Qicheng, estro de la ĉina delegitaro, kiu apenaŭ povis eskapi el la ringo de la fotistoj.

Post akcepto de la tri kongresaj rezolucioj la prezidanto esprimis unue varmajn dankojn al la Alta Protektanto *Sándor Gáspár,* kaj al la Honora Komitato, ĉekape kun *István Sarlós,*

kaj oni vokis al la podio la membrojn de LKK: ĉiuj aparte ricevis dankeman ovacion de la kongreso. Tondra aplaŭdo honoris ankaŭ la preparintojn kaj kunagantojn – veran aron! – de la grandnombraj kunsidoj kaj artaj programoj. Jes, jen, ni alvenis jam neeviteble al la finaj momentoj...

LKK-prezidanto *Endre Baráth* transdonis la flagon al sia posteulo, *Willy Du Temple,* prezidanto de LKK de la 69a. Baráth emociiĝante adiaŭis, Du Temple invitis al Vankuvero, promesante internacian etoson favore al la paco de l' homaro, laŭ ekzemplo de la Budapeŝta UK.

Kaj enmarŝis la etuloj de la *Infana Tendaro* kun florbukedoj, je ĉies korĝojo ride-geste prezentante nian vastiĝantan junularon, generacion de la venonto. Ne estis tro varma la aero de la granda salono, des pli varmiĝis la animstato de la kongresanaro dum la sinsekvaj ĝojplenaj kaj vigligaj momentoj. Granda, improvizita internacia ĥoro harmonie kantis la porkongresan komponaĵon «*Bonvenon... Budapeŝto vin brakumas.*»

Unuanimajn sentojn de la kongresanoj esprimis la ĝenerala sekretario honorante «la tre strečan laboron, la dignan-saĝan-justan prezidadon» de la populara *Maertens.* Dum liaj *finvortoj* nin flatis laŭda aludo al la «hungara Esperanto-fenomeno, spertebla de ĉiuj». Ekde nun ĉies devo estos iom kontribui por inde festeni la Jubilean Jaron! – diris la prezidanto, fermante la 68an kongreson. La ĥorestro donis signon, kaj la internacia ĥoro kun la publiko kvazaŭ unuvoĉe ekkantis nian himnon. Alten flugis la tonoj de la ŝatata melodio super la «granda rondo familia» – kies emociaj adiaŭoj ankoraŭ longe sonis, ĝis iom post iom la Kongresejo enfermiĝis malantaŭ la malrapide disirantoj.

Ervin *Fenyvesi*


**Aperis!** **Aperis!**

**HUNGARA ANTOLOGIO**


# Rezolucioj de la 68a UK

**La 68a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1983 en Budapeŝto**

**t r a k t i n t e la sociajn kaj lingvajn aspektojn de la moderna komunikado,**

**k o n s t a t a s , ke kvankam la komunika teknologio prezentas eblecojn solvi mondajn komunikajn problemojn kaj plialtigi la vivnivelon de parto de la homaro, ĝi riskas – se ne juste kaj demokrate uzata – pligrandigi la fendon inter tiuj, kiuj havas kaj tiuj, kiuj ne havas la rimedojn de komunikado. Tiu risko estas aparte aktuala kiam temas pri evolulandoj rilate al industrilandoj, sed ĝi ankaŭ ekzistas interne de unuopaj landoj,**

**a t e n t i g a s pri tio, ke la teknologia kaj lingva flankoj de komunikado ne estas disigeblaj,**

**r e k o m e n d a s al organizaĵoj interesitaj pri komunikado doni pli da atento al la lingvaj dimensioj de la internacia komunikado kaj al la rolo, kiun Esperanto – per siaj facileco kaj neŭtraleco – povus ludi en tiu kunteksto,**

**a l v o k a s al organizaĵoj okupiĝantaj pri lingva edukado kaj aliaj lingvaj demandoj doni pli da konsideroj al la rezultoj de la evoluo de la komunika teknologio kaj al ties implicoj rilate la nunan lingvan ordon en la mondo cele al ĝia plijustigo kaj plidemokratigo.**

**La 68a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto en Budapeŝto**

**t r a k t i n t e la sociajn kaj lingvajn aspektojn de la moderna komunikado,**

**k o n s c i a n t e pri la rapidega evoluo sur la kampo de komunika teknologio, kaj pri la graveco rilatigi Esperanton al la modernaj komunikiloj,**

**k o n s t a t i n t e , ke la sukcesigo de Esperanto grandparte dependos de la kapablo de ties parolantoj resti en kontakto kun la moderna komunika teknologio kaj montri al la mondo kiel ĝi povos esti utiligata por krei pli justan kaj demokratan ordon, en kiu Esperanto ludas esencan rolon,**

**a l v o k a s al la Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj al ĉiuj sciencaj instancoj okupiĝantaj pri la internacia lingvo doni pli da atento pri komunika teknologio, studi tiun ĉi problemaron, eduki siajn membrojn pri ĝi kaj informi la koncernajn neesperantistajn mediojn pri la perspektivoj de la aplikado de Esperanto en tiu ĉi kampo.**

**La 68a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto en Budapeŝto**

**s t u d i n t e la planojn starigitajn de diversaj Landaj kaj Fakaj Asocioj kaj**

**t r a k t i n t e la ĝisnunajn agadojn rilate al la Centjara Jubileo de Esperanto,**

**k o n s i d e r a n t e , ke la Centjara Jubileo prezentos en la venontaj jaroj nepreterlaseblajn eblecojn por atentigi pri Esperanto,**

**a l v o k a s al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj tra la mondo doni prioritaton al laboroj tiurilataj.**

István Pekár
Direktoro de VIZÉP

# Tri jardekoj por la moderna hidrotekniko

Kiam post la milito oni komencis renovigi kaj en socialisma direkto modernigi la agrikulturon en Hungario, necesis samtempe reorganizi ankaŭ la akvomastrumadon de la lando. Por plenumi ties multspecajn taskojn oni kreis interalie apartan entreprenon, kun la celo realigi la hidroteknikajn konstruaĵojn, precipe por la agrikulturo. La tiam fondita *Entrepreno por Akvoaferaj Konstruadoj* (1951) eklaboris per mankhava ekipaĵo, nesufiĉa maŝinaro kaj precipe per homa forto. La tempo pasis, kaj tiu entrepreno, en kadro de la Nacia Hidrologia Instanco, alte disvolviĝis dum la tri jardekoj: ĝi fariĝis la plej granda entrepreno de la Hungarlanda akvomastrumo kun pluraj miloj da laboruloj, produktantaj valoron de multaj miliardoj da forintoj. La marko VIZÉP pro siaj multloke videblaj faritaĵoj iĝis jam konata en- kaj eksterlande per tia alta renomo, kiu alportis jam sesfoje la distingan titolon „Eminenta Entrepreno".

## La taskoj plivastiĝis

Kio konsistigas la farendojn de tiaspeca ega entrepreno specialiĝinta por akvoaferoj? Ĝia bazo nepre devas esti la plej moderna

Akvonodo Kisköre





Kloakakvo-purigejo en Nord-Peŝto dum konstruado

ekipaĵo, pri kiu ĝi jam disponas en siaj dislokitaj uzinoj kaj laborcentroj, ankaŭ pri faksperta laboristaro kaj eminentaj inĝenieroj. Tiuj faktoroj ebligas al la entrepreno:

— konstrui kaj munti instalaĵojn de municipa kaj industria akvoprovizado kaj poluakvo-purigado,

— konstrui instalaĵojn por preventi akvodamaĝon, kaj

— konstrui antaŭfabrikitajn instalaĵojn, precipe por akvomastrumado,

— efektivigi senakvigon, kaj ŝirmadon kontraŭ enfiltriĝo,

— fari engrundajn laborojn, ankaŭ metilaborojn por la instalaĵoj,

— longdistancajn duktojn kaj kondukilojn de aliaj publikaj servoj.

Ĉiuj ĉi laboroj okazas ofte ankaŭ eksterlande, tiel oni eksportas la produktaĵojn kaj servojn de la entrepreno VIZÉP. Eble ŝajnas interesa maniero, ke la entrepreno preparas laŭ mendoj ne nur teknikajn planojn *por fundamento* de konstruaĵoj, sed se bezonate, ĝi prezentas ankaŭ la planojn por efektivigi ilin per la plej perfektaj teknologiaj rimedoj kaj metodoj. Tiamaniere eĉ mem la mendinto povas direkti tiujn komplikajn konstrulaborojn.

Por sukcese plenumi siajn gravajn taskojn, la entrepreno klopodas konstante *disvolvi kaj novigi* la teknologiojn, krei kaj inventi novajn produktaĵojn, apliki jen pli taŭgajn, jen pli malkarajn aŭ pli facile akireblajn materialojn. Aliflanke restas ĝia daŭra devo regule ripari kaj prizorgi la bonstaton de multaj akvoaferaj instalaĵoj. Lige kun tiuj farendoj estas ankaŭ fabrikataj ŝtaltuboj kaj ŝtalstrukturoj, aparatoj kaj instalaĵoj, kompreneble kun la necesaj kontraŭkorodigo kaj izolado.

### Speciala tekniko

Pioniran laboron faris la firmao pri la profunde ĉirkaŭfer-

maj akvoizolaj muroj, aplikante tiucele tre taŭgan mallarĝ-kavigilon (SOIL-MEC), kun speciala ŝlimpurigilo. Pere de tiu teknologio eblas konstrui ĉian akvoizolan kaj subportan, profundigitan muron, ĉu monolitan, ĉu antaŭfabrikitan. La speciala uzino (en Vecsés) unue enkondukis cele al tiu izolado la bitumadon kun vitrofadenoj por fortigo. Poste oni tiucele aplikis algluiĝajn foliojn.

Nuntempe tiuj profundigitaj izolmuroj estas konstruataj per monolittabuloj, fiksitaj ĉerande per du tuboj, kiujn oni eltiras post betonado. Pluan progreson alportis vasta aplikado de pretaj ŝelaĵ-tabuloj (IS-NOE), bone uzeblaj por betonado.

Poluakvoj, precipe rub-akvoj abunde liveras solidajn amasojn, kiujn konvene diserigas kaj forigas la rub-diserigilo kaj aŭtomata pumpilo (SZEDAR), disvolvita ankaŭ far la uzino en Vecsés. Tiuj utilaj aparatoj kabaplas ĉiuminute diserigi la solidaĵojn el 500-3000 litroj da poluakvo kaj levi ilin ĝis 5-20 metroj.

## Por la energio

Konstruado de akvocentraloj apartenas — kiel konate — al la plej ampleksaj hidroteknikaj laboroj. VIZÉP ofte partoprenas tiurilate: ĝi konstruis la *Akvonodon Tiszalök* (1954), poste la *Akvonodon Kisköre* (1973), la ĝis nun plej grandan kompleksan akvomastruman konstruaĵon de Hungario. Eĉ tiun superos la sekva tasko, la konstruota *Danuba Akvocentralaro Gabčikovo-Nagymaros,* kiu etendiĝos de Bratislavo ĝis Budapeŝto. Tiun grandiozan laboron Ĉeĥoslovakio kaj Hungario kune realigos, kaj ĝi fariĝos parto de la du marojn interligonta tra-Eŭropa akvovojo Danubo—Majno—Rejno.

Cetere VIZÉP konstruis la plej multajn *valbaraĵojn* de akvorezervujoj en la lando, i.a. por la regiona akvoprovizado en montaroj Mátra kaj Bükk, ĉe Lago Velencei, Dunaújváros kaj Tatabánya.

## Akvo en turoj

La entrepreno konstruis depost 1966 tre multe da akvoturoj per kaliko-leva tekniko, kun cisternoj de 1-2000 m³ volumeno. Tiu baziĝas sur profundigita akvoizola ĉirkaŭmuro; super ferbetona plato konstruiĝas — per leviĝanta ŝelaĵo — la ferbetona turo. La kaliko-vazon oni

**La preskaŭ preta akvoturo en Budapeŝto**



**Regiona Akvoprovizejo de Nord-Hungario dum konstruado**

preparas el monolit-ferbetonaĵoj surtere ĉirkaŭ la turo, kaj desur la teg-platformo levilo kun kapablo de 4000 t suprenigas la kalikforman cisternon al sia ĝusta loko.

La bezono por plibonigi la akvoprovizadon, aliflanke la kreskanta industria poluado pli kaj pli postulas protekti la naturmedion kaj ampleksigi la kanalizadon, pliigi la purigadon de la poluakvoj. Multe da tiaj taskoj estis plenumitaj fare de la entrepreno, inter kiuj la plej menciinda, ĉar ankaŭ la plej granda estas la nun konstruata ĉefurba kloakakvo-purigejo de Nord-Peŝto.

## Novaj horizontoj

La teknikajn kapablojn kaj fakajn spertojn de VIZÉP oni abunde utiligas en- kaj eksterlande ĉe engrundaj konstruadoj — precipe se temas pri la jam menciitaj profundigitaj izol-muroj. Lastatempe ekzemple Aŭstriaj firmaoj komisiis la entreprenon tiamaniere fundamenti novajn *hotelojn* en Budapeŝto apud la Danub-bordo kaj aliloke.

La sukcesa agado de la granda entrepreno estas atribuinda, krom la direktado ankaŭ al la fakscia laboristaro. Kompreneble la entrepreno multrilate klopodas zorgi pri ties bezonoj. Ĝi funkciigas proprajn laboristo-hotelojn kun bonaj manĝejoj kaj bibliotekoj. La entrepreno per siaj veturiloj transportas al la laborejoj la laboristojn. Ili havas la eblon ricevi prunton de la entrepreno, se ili ekkonstruas loĝejon por si; al tiuj, kiuj deziras alilande ferii, ankaŭ tion ebligas la plurlandaj interrilatoj de la entrepreno, respektive de ĝia sindikato.

Tre koncize skizante, tiel aspektas la tri-jardeka strebado por apliki kaj disvolvi kiel eble plej modernan teknikon en la akvomastrumado.

Ervin Monostori

# Prezentas sin la Entrepreno por Fabrik- kaj Maŝinmuatado

## 1. IOM PRI LA SPECIALIGITA ENTREPRENO

Dum la akcela industriigo de la hungara ekonomio, la plimultiĝintaj investaĵoj baldaŭ bezonis – eĉ postulis – apartan, alcelan entreprenon por plej fakscie fari la instaladon. Tial kreiĝis kaj rapide ampleksiĝis nova entrepreno, kiu pli kaj pli specialigis sin por munti surloke en la industriaj konstruejoj teknologiajn aparatarojn. Depost tri jardekoj grandnombre plenumis en- kaj eksterlande teknologian konstruadon la *Entrepreno por Fabrik- kaj Maŝinmuntado.* La entrepreno bonsukcese kaj ofte plenumis tre postulemajn taskojn en diversaj mondpartoj.

Ĝi enkonstruas la tutajn teknologiajn instalaĵojn por industrioj de metalurgio, ŝtalo, aluminio, energio, kemiaĵoj, tekstilaĵoj, kosmetikaĵoj, paperoj, nutraĵoj kaj konstrumaterialoj. Kiel entreprenanto, ofte kiel partnero de gravaj eksterlandaj firmoj – kaj kapitalistaj, kaj socialistaj –, ĝi partoprenis multajn grandajn konstruadojn tra la mondo.

Tiaspeca granda entrepreno ne povas sin limigi nur je novaj konstruadoj. Pro tio ĝi volonte rekonstruas fabrikojn, uzinojn aŭ ties sekciojn, krome faras en ili ampleksigon, renovigon kaj konservadon. Al tiuj aldoniĝas fabrikado, respektive antaŭfabrikado de teknologiaj instalaĵoj, ŝtalstrukturoj, cisternoj, tubkondukiloj – ĉu kiel parto de la mendita muntado, ĉu kiel aparta, okaza tasko.

La entrepreno akiris la kapablon projekti mem certajn teknologiajn sistemojn, respektive ties partojn. Ĝi liveras eĉ la dokumentaron por realigi ilin, faras planojn pri procezoj dum la muntado, krome prilaboras teknologiojn por veldado, muntado, levado kaj ceteraj specialaj taskoj.

Kompreneble tiu ampleksa agadkampo necesigas taŭgajn kontaktojn kun negocpartneroj, investantoj kaj projektantoj, krome sisteman instruadon al la faklaboristoj. La altnivela konstrulaboro devas esti certigata pere de celkonscia, zorga planado pri la farendaj taskoj kaj surbaze de preciza preparado de ĉiuj muntadaj kaj aliaj laboroj.

Dum la jardekoj pruviĝis, ke estas preferinde, se inter la planado kaj la fina ekfunkciigo de la instalaĵo la entrepreno akceptas *pluajn* taskojn – krom al kutimajn –, ĉar la investantoj ĝenerale bezonas la fakspertajn konsilojn pri la muntado kaj sekve ankaŭ plurspecajn akcesorajn kromlaborojn.

## 2. MAŜINOJ POR LA MUNTADO

Kiam en iu konstruejo oni surloke instalas la teknologian aparataron, dum muntado de maŝinoj, cisternoj, ŝtalstrukturoj kaj teknologiaj tubaroj multfoje necesas tiaj specialaj farendoj kaj laborfazoj, kiuj ne estas plenumeblaj per la kutimaj laboriloj. Ili postulas apliki celtrafajn, specialajn ilaron aŭ maŝinojn, do ekster la propra metiejo, ofte subĉiele.

Pro tiuj kaŭzoj montriĝis tre utile por kaj laŭ propraj bezonoj disvolvi kaj apliki diversajn muntad-maŝinojn. Tial oni disvolvis inter aliaj oportunajn maŝinojn por movi, transporti kaj levi materialojn en la konstruejoj, aparatojn por veldado kaj termomanipulado, specialajn prilaborilojn por profilŝtaloj, lamenoj kaj ceteraj duonproduktaĵoj, laŭcelajn ilaron, aparatojn kaj maŝinojn por la teknologia tubmuntado, por surloke fabriki kaj munti cisternojn – se mencii kelkajn ekzemplojn.

La ĉefaj karakteriziloj de tiuj muntadmaŝinoj estas la jenaj:

– ili kreiĝis precipe por eksteraj muntadlaboroj, kie oni postulas ne-grandan amason, moveblon kaj rapidan transigeblon;

– pro la kutima variado de la dimensioj ĉe muntado, la maŝinoj kapablas prilabori plurajn dimensiojn de la opaj materialoj (tubo, lameno ktp.) sen ŝanĝi akcesoraĵojn; pro tio la aplikeblo de tiuj maŝinoj estas relative vasta kaj tre facila;

– aro da tiuj maŝinoj fariĝis por ebligi manipuladojn, kiuj en ekstera loko tute ne estas plenumeblaj sen ili;

– alia grupo de la maŝinoj estis konstruita por fari certajn manipulojn pli produktive kaj sekure, kun malpli da kostoj.

La aplikado de tiuj maŝinoj do ĉiam alportas ŝparon de materialo, energio kaj labordaŭro kaj malpliigas la kostojn de la koncerna manipulo.

Pluraj maŝinoj estas favore aplikeblaj ĉe multaj entreprenoj de la maŝin- kaj konstru-industrioj, kaj ankaŭ ĉe aliaj entreprenoj, kies ĉefaj okupoj ne direktiĝas al ekstera muntado, tamen laŭnecese ili ofte faras ankaŭ tion.

Pro la diverskampe kaj multe spertita praktikeco de tiuj ĉi muntad-maŝinoj, la postulo pri ili iĝis surprize vasta.

*Pro tio la entrepreno volonte akceptas proponojn de en- kaj eksterlandaj fabrikoj, kiuj intencas transpreni la fabrikadon kaj komercadon de la disvolvitaj muntadmaŝinoj!*

Ĉi-sube ni prezentas la plurloke uzeblajn kaj plej elprovitajn muntad-maŝinojn kun la ĉefaj teknikaj datoj kaj aplikebloj.

Estas jam preparata la seria fabrikado, ankaŭ la garantia

servado, la kompletigaj maŝineroj, same la konvena kunlaboro, jen kun la mendantoj, jen kun la partneroj, kiuj intencas siavice ankaŭ fabriki, respektive vendadi tiujn muntad-maŝinojn. Tiurilate validas la devizo:

**Moderna muntado — plia rendimento!**

Kompreneble la partner-entrepreno fruktuzos la fakton, **ke ĝia sortimento da produktaĵoj ampleksiĝas per novaj varoj!**

## 2.1 Grupigo de la maŝinoj

La tie ĉi prezentotaj muntad-maŝinoj estas aplikeblaj prefere ĉe teknologia tubmuntado, fabrikado kaj muntado de cisternoj, kaj ĉe ofte okazantaj aliaj manipuloj, tiamaniere bone mekanizeblaj. En la sekva priskribo de la maŝinoj ilia grupigo okazos laŭ la ĉefaj fazoj de la tubmuntado:

- dispecigo de tuboj, prilaboro de veldaj juntoj,
- tub-arkado,
- fabrikado de debranĉigaj fitingoj,
- alfiksigaj aparatoj por veldado,
- turnantaj aparatoj por veldado,
- aparatoj por tub-kunigo,
- aparatoj por premprovo,
- maŝinetoj por bazaj muntadlaboroj.

### 2.1.1 Dispecigo de tuboj, prilaboro de veldjuntoj

La dispecigo de tuboj, kaj la bevelado (akrigo) por veldado, okazas ĉe krudaj ŝtaloj plejofte per flamtranĉado. Tiun manipuladon faciligas, rapidigas kaj samtempe igas pli preciza tio, se oni uzas la jenajn simplajn aparatojn:

**FLAMTRANĈATORO**

**N-ro: 1. Tipo: 587**

Permana aparato por malgrand-dimensiajn tubojn dispecigi kaj oblikve beveli per flamtranĉado. La artik-sisteman centrigan mekanismon, kaj kun ĝi la tutan aparaton oni povas fiksi per kanelita ŝafto, interne de la tubo. Dum tranĉado oni turnas mankrankon, sekve la tranĉa flam-ajuto «Varga» kontinue ĉirkaŭiras kaj tratranĉas la tubon.

*Teknikaj datoj de la prilaboreblaj tuboj:*

materialo: karbaj ŝtaloj
diametro, mm: 159—324
diko de la tubvando, mm: maks. 32
bevela angulo: 0—45°

**ĈENA TUB-TRANĈATORO**

**N-ro: 2. Tipo: CSV 144**

La kranoj kaj la tranĉ-ajuto de la rekta tranĉ-ŝalmo «Toldi» troviĝas sur ĉareto, kiun risorte strečita Ewart-ĉeno fiksas sur la tubvandon. Pro turno de mankranko la aparato ĉirkaŭiras la tubon kaj la flam-ajuto tranĉas ĝin. La brulgaso povas esti propan-butano aŭ dissolv-gaso.

La aparato estas facile alĝustigebla al la diametroj de la tuboj. Ĝi konvenas por ortaj tranĉo, dispecigo kaj funeligo, certigas ortecon de la tranĉ-faco al la tuba akso kaj glatan surfacon.

*Teknikaj datoj de la prilaboreblaj tuboj:*

ekstera diametro, mm: 100—600
materialo: karbaj ŝtaloj
diko de tubvando, mm: maks. 32
bevela angulo: 0-45°
propraj dimensioj, mm: 350x250x300
maso, kg: 9

**Tub-tornatoro kun premrulo (N-ro 3)**



## Tub-tornatoroj

Prilabori tubojn ne ĉiam eblas per flamtranĉado. Forte alojitaj tubmaterialoj ne estas tiel tranĉeblaj, maksimume per plasmo-arko. Altaj postuloj pri kvalito de la veldjuntoj, granda vando-diko kaj komplikaj juntolinioj same ofte malebligas la flamtranĉadon. Tiam oni uzas tajlan prilaboradon. Universala tornatoro nur malofte aplikeblas, ne sole ĉar en konstruejo kutime ĝi ne troveblas, sed ankaŭ pro tio, ke la ĉefa gvidŝraŭbo malsufiĉas por la ofte pli grandaj tub-diametroj.

Pro tio la entrepreno disvolvis plurspecajn specialajn tajlatorojn, tn. tub-tornatorojn. Ekzistas do jam celmaŝinoj praktike por ĉiuj ajn kutimaj dimensioj kaj tub-dikoj inter 50 kaj 1000 NA, por ĉiaj ŝtaloj, kaj por ĉiaj, simplaj aŭ komplikaj veldjunto-linioj, farendaj ĉe altkvalitaj tub-muntadoj (kemia industrio, reaktortekniko). La kostoj de la celmaŝina prilaboro estas pli malaltaj ol ĉe tradiciaj metodoj.

Tiuj tub-tornatoroj ebligas prilabori specialajn juntojn: en certaj komplikaj kazoj (Lippe-junto, subringa junto) oni devas prilabori ankaŭ en la tub-interno pro la junt-prepara precizeco, postulata de modernaj veld-metodoj aŭ ĉe subringigo.

Ĉiuj ĉi tub-tornatoroj prilaboras vertikale starantajn tubojn, ĉar turni la grand-amasajn tubojn estus malfacile kaj danĝere, krome nur tiel eblas labori sur enmuntitaj tub-etapoj. La variantoj de tiuj ĉi tub-tornatoroj spegulas la malfacilaĵojn de la maŝinkonstruado kaj tajlad-teknologio, kiu lanĉiĝas ĉe tiel komplikaj taskoj. Pro tio la maŝinstrukturoj necese varias laŭ la specialaĵoj de la konkretaj taskoj kaj cirkonstancoj.

### TUB-TORNATOROJ KUN PREMRULO

**N-ro: 3 Tipoj: ECS 352 M ECS 314 M ECS 315 M**

Laŭ samaj konstru-principoj estis fabrikitaj tri maŝinoj kun diversaj dimensioj, por tub-diametroj inter 50–150 NA. El ekstere centrigeblaj, per kelkaj movoj eblas fiksi ilin sur la tubo. La prema tubfiksilo centrigas sin mem aŭtomate ĉe ĉiuj tubo-dimensioj, sen ŝanĝo de akcesoraĵoj.

Sur la rotacianta il-fiksilo troviĝas du iloj: detranĉilo kaj form-tranĉilo (1/2 V), el durŝtalo. La maŝinon funkciigas portebla elektra drilo (boraparato), kiu estas facile alkontaktigebla, ankaŭ aparte uzebla. La maŝino prilaboras krudajn ŝtaltubojn de modestaj vand-dikoj, dispecigas (detranĉas), krome igas glata la juntofendon.

La tub-tornatoroj kun streĉrulo estas favore uzeblaj por junto-preparo de mezdimensiaj tuboj, kaj en uzino, kaj en konstruejo, estante simplaj, funkcisekuraj maŝinoj.

### TUB-TORNATORO NA 300x

**N-ro: 4 Tipo: ECS 375 M**

Uzebla por detranĉi kaj junton prepari ĉe grand-diametraj, krudaj kaj tre alojitaj tuboj, prilabori ekstere kaj interne laŭplaĉe komplikitajn juntoliniojn. Pro speciala rapidum-skatolo ĝi uzeblas ankaŭ ĉe dikvangaj tuboj. La fiksilo, tenanta la tubon, kapablas sin centrigi ĉe ajna tuba dimensio inter la limaj dimensioj.

*Teknikaj datoj:*

ekstera diametro de prilaborebla tubo, mm: $\phi$ 159–324
tuba vand-diko, mm: s= maks. 25
averaĝa torn-rapido, mm/min: 17
laŭlongira rapido, mm/turno: 0,07–0,14
povo de propra elektromotoro, kW: 2,2
elektra tensio: 3x380 V, 50 Hz
propraj dimensioj, mm: 820x1000x1300
maso, kg: 250

### TUB-TORNATORO NA 500

**N-ro:5 Tipo: ECS 270**

Uzebla ĉe tuboj el krudaj kaj alojitaj ŝtaloj, kun vandoj normalaj kaj dikaj. Fareblas detranĉo kaj junto en ajna komplika linio, ankaŭ tulip-junto. Uzebla krome por prilabori la eksteran kaj internan surfacojn de la tubofino. Ĝia tubotena fiksilo estas memcentriga.

*Teknikaj datoj:*

ekstera diametro de prilaborebla tubo, mm: $\phi$ 300–500
tuba vand-diko, mm: s= maks. 28
maks. torn-rapido ĉe 500 mm diametro, m/min: 22
laŭlongira rapido, mm/turno: 22
povo de propra elektromotoro, kW: 2,2
elektra tensio: 3x380 V, 50 Hz
propraj dimensioj, mm: 1300x900x1100
maso, kg: ĉ. 390

| *Teknikaj datoj:* | ECS 352 M | ECS 314 M | ECS 315 M |
|---|---|---|---|
| tuba diametro ekstere, mm: | $\phi$ 51–83 | $\phi$ 89–121 | $\phi$ 127–159 |
| tuba vand-diko, mm: | maks. 12 | 12 | 12 |
| averaĝa torn-rapido, m/min | 16 | 16 | 16 |
| laŭlongira rapido, mm/turno | 0,083 | 0,083 | 0,083 |
| junta angulo | 30° | 30° | 30° |
| ĉefaj dimensioj, mm | 280x350x540 | 265x395x605 | 265x435x630 |
| maso, kg | 21 | 25 | 29 |



Ĉena tub-tranĉatoro (N-ro 2)

### TUB-TORNATORO 560
**N-ro:6 Tipo: ECS 464**

La tajlaj karakterizoj kaj servoj estas konformaj kun la antaŭa maŝino n-ro 5, tamen diferencas de ĝi en kelkaj konstrudetaloj. I.a. la same memcentriga tubotena fiksilo estas de alia sistemo, ankaŭ la prilaboro de la facoj okazas per alia metodo.

*Teknikaj datoj:*

ekstera diametro de prilaborebla tubo, mm: $\phi$ 320–560
tuba vand-diko, mm: s= maks. 25
torn-rapido, m/min: 11–19,4
laŭlongira rapido, mm/turno: 0,0725–0,145
povo de propra elektromotoro, kW: 2,2
elektra tensio: 3x380 V, 50 Hz
propraj dimensioj, mm: 1280x960x1400
maso, kg: 590

### TUB-TORNATORO 325/245
**N-ro 7 Tipo: 662**

Speciala celmaŝino, konstruita por prilabori sole tri diversdimensiajn aŭstenitajn tubojn. Ties dimensioj estas: $\phi$ 325x24, 273x20 kaj 245x19 mm. Ĝi kapablas detranĉi, torni la junton, prilabori ĉiujn eksterajn kaj internajn facojn. Estas specialaĵo de la maŝino, ke eblas disigi ĝin en du partojn, kaj tiel surmeti ĝin ie ajn sur enkonstruitan tub-etapon por ĝin tie ekfunkciigi. La bevelon – tranĉfaceton – eblas prilabori oblikve al la ebeno orta al la tubakso, ĝis klino de 1°. Tio faciligas precize kunigi la tubofinojn.

*Teknikaj datoj:*

plej mallonga tubolongo, mm: 200
torn-rapido, m/min: 12,8–17
laŭlongira rapido, mm/turno: 0,025–0,15
povo de propra elektromotoro, kW: 2,2
elektra tensio: 3x380 V, 50 Hz
propraj dimensioj, mm: 1250x1250x750
maso, kg: 390

### TUB-TORNATORO 560 S
**N-ro 8 Tipo 576**

La maŝino estas konstruita por aŭstenitaj tuboj kun dimensio $\phi$ 560x32 mm, por speciala juntolinio (kiu tamen estas facile ŝanĝebla). Ankaŭ tiu maŝino estas disigebla en du partojn, do uzebla ankaŭ sur enkonstruitaj tub-etapoj. La rapidum-skatolo ricevis specialajn modifojn.

*Teknikaj datoj:*

plej mallonga tubolongo, mm: 250
torn-rapido, m/mm: 19
laŭlongira rapido, mm/turno: 0,0625–0,15
povo de elektromotoro, kW: 2,2
elektra tensio: 3x380 V, 50 Hz
propraj dimensioj, mm: 1220x1220x750
maso, kg: 390

Estas disvolvata ankaŭ alia tub-tornatoro, por tubo kun $\phi$ 990x70mm, interne plakita per aŭstenita ŝtalo.

## 2.1.2 FARADO DE TUB-ARKOJ

Muntad-entrepreno aĉetas ĝenerale de fakcelaj firmoj la erojn de tubdukto, tiel ankaŭ la tub-arkojn. Tamen praktike montriĝis pli konvene por la kontinua laboro, se la muntadon farantoj mem posedas tiujn aparatojn, per kiuj eblas «hejme» produkti almenaŭ parton de la necesaj tub-arkoj.

Tubarkojn oni produktas ĝenerale per fleksado de rekta tubo, uzante varman aŭ nevarman formadon. Por tubarkoj de grandaj diametro kaj vando-diko, necesas specialaj kaj multekostaj instalaĵoj – muntad-entrepreno

kutime ne posedas tiujn. Tamen se temas pri mezaj dimensioj, kaj la fleksa radiuso ne atingas la trioblon de la tuba diametro, la fleksado eblas en nevarma stato kaj per relative simplaj rimedoj, en akceptebla kvalito.

Jen kelkaj tubofleksaj aparatoj, resp. maŝinoj, disvolvitaj far la entrepreno, per kiuj oni povas fari laŭnormajn tubarkojn per nevarma formado.

### TUBOFLEKSA APARATO 16
**N-ro 9 Tipo: 834**

Taŭgas por fleksi et-dimensiajn tubojn, kun diametro 8-16 mm. Oni uzas ĝin en stabla fiksilo. La tubo estos permane fleksita sur volvan diskon (ŝanĝeblan laŭ la tuba diametro), kiu havas kanelon konforman al la tuba profilo. Sur la ekstera flanko de la arko, profila buteo (relo) gvidas-protektas la tubon kontraŭ troa platiĝo. La fleksado eblas inter 0—180°.

### TUBOFLEKSA APARATO 32
**N-ro: 10 Tipo: 787**

Ĝia tasko estas simila al la antaŭa aparato, parte ankaŭ simile ĝi funkcias. Ĉu en stabla fiksilo, ĉu sur stativo, oni same fleksas la et-dimensiajn tubojn inter la profilhavaj disko kaj framo per mana turno de kranko. Pro plia rezistanco de grandaj tuboj, ili estas fleksataj per helica transmisio. La aparato estas uzebla por fleksi forte alojitan, aŭstenit-strukturan tubon, sen tio, ke la ĉekrudaj ŝtaloj uzinita arko bezonu postmanipuladon por forigi feritkovraĵon. Disko kaj buteo estas ŝanĝendaj laŭ la tubdimensioj.

*Teknikaj datoj:*

ekstera diametro de la flekseblaj tuboj, mm: $\phi$10, 14, 18, 20, 25, 30, 32

**Tub-tornatoro (N-ro 4)**



fleksa radiuso, R, mm: ĉiukaze 100
angulo de fleksado: 0—180°
propraj dimensioj, mm: en stabla fiksilo 505x840x1080
kun stativo 505x840x1080
maso, kg: sen stativo kaj akcesoraĵoj: 60
kun stativo: 90

## PREMKAPA TUBOFLEKSATORO
**N-ro 11 Tipo: 616**

La maŝino konsistas el du ĉefpartoj: fleksilo kaj hidraŭla parto. En la fleksilo la tubon subtenas du profilruloj, la profila premkapo moviĝas antaŭen sur relo: pro la reagfortoj agantaj sur la du subtenantoj, la tubo fleksiĝas kaj metiĝas en la profilkanelon de la premkapo.

La fleksilon duktoj interligas al la hidraŭla parto, kiu konsistas el mana pumpilo, oleokuvo kaj premdirektiloj. Ruloj kaj premkapo estas ŝanĝendaj laŭ la tub-dimensioj. Por fleksado oni funkciigas permane la oleopumpilon. Bonkvalita flekso ĉe krudaj ŝtaloj estas akirebla prefere per dikvangaj tuboj.

*Teknikaj datoj:*

tuba diametro, mm: $\phi$ 57—76—89—108
tuba vandodiko, mm: S = 5-16 5-16 6-16 8-16
fleksa radiuso, mm: R = 228 304 356 432
angulo de fleksado: 0 — 100°
fleksa rapido, cm/min: 2 — 4
nominala premo, baro: 160
maks. fleksa momanto: 35 000 Nm
propraj dimensioj, mm: 1700x1750x700
maso, kg: (kun akcesoraĵoj) 500

## TIR-STANGA TUBOFLEKSATORO
**N-ro 12 Tipo: CSIH 126A**

Per nevarma fleksado nur tiam fariĝas bonkvalita arko, se dume la tubo estas ankaŭ interne subtenata. Tion celas la tirstango, t.e. cilindroforma ilo, fiksita en la tubinterno dum fleksado.

Unu ekstremon de la tubo oni fiksas al la profilhava disko, kaj la stangon oni enŝovas en la tubon. Sur la profildisko la tubo estos ankaŭ de ekstere premata, por ke ne okazu misflekso. Post enŝalto de la hidraŭla movilo, ĝi ekturnas la diskon, kiu fleksas sur sin la tubon kaj samtempe tiras ĝin desur la stango.

Bonkvalitaj fleksoj rezultiĝas ĉe ajnaj ŝtaltuboj. Oni devas ŝanĝi la fleksan diskon kaj la stangon laŭ la tub-dimensioj. Ĉiuj movoj okazas per maŝina funkciigo. La fleksa radiuso estas ĉiukaze: R=3D.

*Teknikaj datoj:*

tuba diametro, mm: $\phi$57, 76, 89, 102, 108, 133, 159
tuba vandodiko, mm: S = 3 — 6,3
angulo de fleksado: 0 — 90°
povo de elektromotoro, kW: 7
elektra tensio: 3x380 V, 50 Hz
oleopumpilo: dentrad-pumpilo 160 baroj
propraj dimensioj, mm: 5500x2120x840
maso: (kun akcesoraĵoj) ĉ. 5 t

Pli grandajn tubojn ol 150 NA, la entrepreno fleksas per propre disvolvita indukta turbofleksatoro.

## TUBSEGMENT-TRANĈMAŜINO
**N-ro 13 Tipo: DC 349 M**
**DC 404 M**

La tubsegment-tranĉmaŝinoj funkcias duonaŭtomate. Ŝablonoj ne estas bezonataj. La tubfiksilo mem centriĝas, kaj post kelkmova aranĝo sur la regmekanismo, la maŝino dum mallonga tempo elformas kun laŭdezira angulo la oblikvajn tranĉaĵojn de la tubsegmento.

La prilaboro okazas per flamtranĉa aŭ plasmo-tranĉa ŝalmo. Aplikebla ankaŭ ĉe krudaj kaj tre alojitaj ŝtaltuboj. Laŭ sama mekanismo konstruiĝis du variantoj de la maŝino por du dimensiaroj.

*Teknikaj datoj:*

| tipoj | DC 349 M | SC 404 M |
|---|---|---|
| diametro, mm: | 80—150 | 200—500 |

tuba vandodiko, mm: S= maks. 32
tranĉa angulo (rilate al la tuba direktanto): 90—45°
prilaborita rapido, m/min: 0,1—2,4
elektra tensio: 3x380 V, 50 Hz
propraj dimensioj, mm: 1400x900x900
maso, kg: 900, 400

**Pri la muntad-maŝinoj volonte informas:**

**ENTREPRENO POR FABRIK- KAJ MAŜINMUNTADO**
**TEKNIKA DIREKCIO**
Budapest VI., Paulay Ede u. 52.
H—1061 Tel: 217—720

(Finota en la sekva numero)

(Tradukis: Ervin *Fenyvesi*)

**Tubsegment-tranĉatoro (N-ro 13)**



# KONGRESA GAJA PAĜO

Oni rakontis dum paŭzo pri iu komencanto, kiu ekveturis el iu germana urbeto al la 68a. En la trajno la konduktoro mire rigardis lian bileton:

— Devas esti ia eraro, sinjoro! Via bileto validas al Budapeŝto, sed nia trajno veturas al Kopenhago.

— Terure! — kriis nia kongresano —, ĉu paneis la menso de tiu lokomotivestro?

* * *

Estis longa la prelego de iu gasto pri la ĉeftemo «komunikado». De Platono ĝis Einstein la citaĵoj sekvis unu la alian, la malfeliĉa interpretisto devis reciti eĉ la fremdlingvajn fontojn de liaj citaĵoj. Poste la gasto demandis estraranon, kiel plaĉis la prezentaĵo?

— Malgraŭ la multaj fontoj el kiuj vi ĉerpis, ĝi ŝajnis iom *seka...* — sonis la trafa «hidrologia» konstato.

* * *

Kiu streĉis iom la orelojn, povis foje aŭdi kuriozajn dialogojn antaŭ la bufedoj kaj sur la teras-renkontejo. Ekzemple tian:

— Amiko! Vian rozbukedon donu al mi por kelkaj minutoj! Nur prunte!

— Kiel do, ĉu vi pruntepetas ĝin?

— Jes, por mia kongresa edzino! Ni tuj interkverelos, feliĉe, do post kvin minutoj mi jam revenos kun viaj rozoj...

* * *

— Mi estis plene trompita de tiu aĉulo! Aŭskultu, Eva! Jam post la Inaŭguro, eĉ jam posttagmeze dum la solena malfermo, mi dediĉis al li mian plenan amon, ĉar mi naive kredis liajn amkonfesojn. Kaj jen, li alcelis nur miajn Esperanto-insignojn el Oceanio...

* * *

Ĉiutage plimultiĝis la bufed-tabloj, la servantoj volonte ekbalbutis Esperante, sed silentis pri la kaŭzo de tiu bonvena kreskad-fenomeno. Foje malkovris ĝin grandokula, sed ne tro svelta kongresanino, sed jene:

— *Neniam* mi permesos al mi *hejme* tiom da sukeraĵoj kiel nun inter du ŝtuparmarŝadoj supren kaj reen, supren kaj reen...

*Fakulo sen makulo* estas malofta kukolo — diras Mirlanda proverbo. Tion ni pensis, aŭskultante la pilastron apogantan renoman preleginton, kiu energie asertis al la ĉirkaŭantaj glaslevantoj:

— Prelegi ĉiu kapablas! Sed kiu pekos *tiel malmulte* kontraŭ la gramato, do-do, gramatiko... kiel mi... post unu litro? !

* * *

— Ĉu mia triumfo? *Tri fumoj!* — jes, nur tiom restis el miaj amaj triumfoj! — koleris sub siaj lipharoj filo de Mediteraneo, kiu antaŭ la kongresa balo multe rakontis pri grandiozeco de taŭrobataloj. — «Mian amtriumfon sekvis plena fiasko!»

— Kiel do? Ĉu eble ŝi perdiĝis nokte en la kongreseja labirinto?

— Tute ne! Sed mi neniel kapablis malfermi tiujn damnitajn modernajn zipfermilojn...

* * *

Post «hunda varmego» de la unuaj kongrestagoj, la ekskursa tago prezentis sin per ege granda pluvo kaj malvarmo. En la aŭtobuso de la malĝojaj nudistoj — pardonu: naturistoj! — ĵusbakita «kongresa edzino», jam ne juna kokideto, kun feliĉa mieno rigardis la ĉielan kaskadon: «Kia bonŝanco, tiu pluvego! Mi ne devos do senvestiĝi...»

* * *

Mezaĝan sinjoron ni aŭdis rakonti siajn kongresajn travivaĵojn — kiuj estis ja komunaj kaj publikaj, do kial nun ripeti ilin? Prefere ni citu *la intiman:* «Nur unusolan kongresaninon mi alparolis dum la Interkona Vespero... sed ŝi restis apud mi dum la tuta semajno!»

* * *

S-ino Ada Csiszár, kiu respondecis interalie pri la en-ujigo de la multegaj dokumentoj, ofte bezonis helpon por transporti la pezajn pakaĵojn. La deponejo de la dokumentoj estis en la saŭno de la Sporthalo. Foje, ne trovinte helpanton en la proksimeco, per laŭtparolilo (aŭdebla en la tuta Sporthalo) ŝi provis varbi, jene: «*S-ino Ada Csiszár atendas kvar-kvin fortajn virojn en la saŭno.*» Je la ekscita invito venis eĉ pli da viroj, ja ili ne povis scii, ke la kialo de la invito estas — transporti pakaĵojn...

*E. F.*

# Korespondi deziras

Nils-Erik *Ekstën* (35) skoltestro, sveda fraŭlo, int. pri laboroj kun homoj, flegado, agado ruĝkruca, naturo, bestoj, foto, vojaĝoj, ankaŭ germane kaj angle koresp. kun junulinoj (petas foton bv.). *Tarnsjő,* POB 38, S-740 45. — Aivar *Liepinŝ* (22) bibliotekisto, pri ĵurnalistiko, fremdlingvoj. *Madona-1,* p.k. 25, Latvio, SU-229.220. — Anna *Lewandowska* (24) pri vivo de junuloj, muziko, fotado, teatro, filmo, turismo. *Varsovio,* ul. Kolorowa 8/3, PL-02-495. — Jadwiga *Dutkiewicz* (25) samaj interesoj, kaj kol. pm. *Poswietne,* Cygow Nowy, PL-05-326. — S-ro *Saito* tadasi (18) studento kun gejunuloj el FRG, kc. pĉt, C/o Matano ziro, 1011 Ooaza-hirai, Yamaguchi-ŝi, J-753. — S-ro Uĉida (11), F-inoj Takeda (12) kaj Lida (18) ĉe Esaki Masayasu, pĉt, ktm. Momoyama cho, Akiiyama 28-32, Fuŝimi-ku, *Kioto,* J-612. — S-ro *Komacu* masahiko (19) studento, ktm, pri lingvistiko. C/o Sakai, 1-3-7 Sekiguci, Bunkyo-ku, *Tokio,* J-112. — S-ro *Suzuki* satoru (20) studento, kun simila junulino, el FRG, kc. pri kulturo, kc, C/o Kokusaigo Kyoiku, Dai 2, Kitazawa-so, 1-7-7, Matsubara, Setagaya-ku, *Tokio,* J-156. — S-ro *Honma* takeru (19) studento laŭeble kun veterano, kc, ktm, pri lingvistiko, kc. C/o Murayama Gakuryo, 3-13-9 Koisikawa, Bunkyo-ku, *Tokio,* J-112. — F-ino *Komacu* hideko (19) studentino, kun orienta Eŭropo, pri studenta vivo. C/o Misawa-so, n-ro 8, 1-13-6 Funabasi, Setagaya-ku, *Tokio,* J-156. — S-ro *Išihara* kenĵi (21) kun gejunuloj ktm, pri vivo kc. 5-4-12-504 Ootemaĉi Naka-ku, *Hirošima*, J-730. — S-ro *Uatai* jasuhiro (21) studento kun junulino ktm, pĉt. 21-7 Honura-ĉo, Minami-ku, *Hirošima*, J-734. — S-ro *Macumoto* takeŝi (21) studento, ktm, pĉt. 11666-2 Hiro-maĉi Kure-si *Hirosima-ken* J-737-01. — Instruistino Krystyna *Sitnik* (23) kun ges-anoj pĉt. akiri amikojn. *Ostrów W.* ul. Krol. Jadwigi 8 B/9, PL-63-400. — *Jadkauskiene* Irute (42) bibliotekistino, ktm pri literaturo, muziko, kino, vojaĝoj, kol. pk. *Kaunas,* R. Armijòs 362-49, Litovio, SU-233.030. — S-ro Gintaras *Žiaunys* (18) ktm, pĉt, kun diversaĝaj, ankaŭ A.R. *Mažeikiai,* Žemaitijos 9-25, Litovio, SU-235.500. — Italaj lernantinoj ĉiuj en Milano, I-20.100: *Albanese* Mariangela (15) Via lucca 32. — *Bargiggia* Cristina (16) Via Grau S. Bernacolo 15. — *Ceretti* Maria (17) Via del Danubio 6. — *Dell'oca* Ida (15) Via Pareto 13. — *Gammino* Giovanna (16) Via Cenisio 77. — *Gusso* Elisabetta (16) Via de Calboli 4. — F-ino Danute *Daĉiulyté* (15) pĉt, ktm, certe resp. Litovio, SU-234.880 *Kupiškis,* Lauko 11. — *Ribalov* Aleksandro (29) fraŭlo, fotokemiisto, pri mod.muziko, kino, fotado, kol. sondiskojn, kalendaretojn, bk, E-aĵojn. SU-252.140 *Kiev,* Miljutenka 5, kv. 34. — Geedzoj Dara k Jurij *Kaluĵnij* studentino k aspiranto, int. pri vojaĝoj, mod. k orienta muziko, sporto, filozofio, trikado, (rec. gastado). *Lvov,* Str. Aralska 4-1, SU-290.065.


**Aperis!** **Aperis!**

**HUNGARA**

**ANTOLOGIO**


# KOREKTOJ

de erarigaj preseraroj en antaŭaj numeroj. Bonvolu korekti.

*1983/1* (p.6, kolumno 1a, desube linio 4a): grizvangaj *greboj...*
(p.15, kolumno 2a, alineo 2a): anstataŭ la jaroj 1915 kaj 1917 devas esti 1925 kaj 1927.

*1983/2* (p.47, antaŭlasta linio): *parfumaĵo.*
(p.61, titolo dekstre): Ekstera *komerco* dum 1982.
(p. 66, kolumno 2a, linio 5a): *Gravaj* spertoj...
(p.74, kolumno 1a, linio 12a): Tiu *ŝajna* tradukmašinkaraktero...

*1983/3* (p.91, kolumno 3a, desube linio 13a): kérek egy pohár *vizet...*

*1983/4* (p.127, fina alineo): kaj ni *adiaŭas* al Bükk.

Ni pardonpetas pro la eraroj.

## Ni petas tiujn legantojn...

kiuj abonas nian revuon en eksterlando ĉe ne-ŝtataj perantoj, ke ili bonvolu pagi sian abonkotizon por 1984 kiel eble plej frue. Oni komprenu, ke la administra vojo de tiaj abonoj estas sufiĉe longa, tial la frua pago estas nepra antaŭkondiĉo de la rapida kaj akurata liverado de la revuo. Ni petas do *ne* atendi la ricevon de la n-ro 1983/6, sed *tuj* sendi la kotizon al la peranto.

## Por niaj legantoj

La distribuejo de la Hungara Poŝto informis nin, ke ekde nun HV estos aĉetebla en Budapeŝto nur en la subaj — pli grandaj — gazetvendejoj. Do, Budapeŝtaj esperantistoj estas petataj serĉi nian revuon nur en la gazetvendejoj ĉe la subaj adresoj (ĉiuj en Budapeŝto):

| Adreso | Telefono |
|---|---|
| V. Váci út 10. | 185-604 |
| V. Szabadsajtó u. 6. | 184-840 |
| SUGÁR Üzletközpont Örs vezér tér | 843-160/69 |
| Magyar Jakobinusok tere Déli pu. | — |
| Szt. István krt 25. | 314-334 |
| I. Bem u. 9. | 352-346 |
| V. Felszabadulás tér 4. (Párizsi udvar) | 181-401 |
| József nádor tér 1. | 185-850 |
| CORVIN Áruház | 335-551 |
| Lenin krt. 17. | 423-929 |
| Hegedüs Gyula u. 43. | 491-505 |
| Baross u. 59. | 131-286 |
| SKÁLA Áruház | 852-222/28 |
| Petőfi Sándor u. 17. | 189-013 |
| Rákosfalva park 3/c (XV.) | 847-274 |
| Hírlapbolt (KHI) V. Bajcsy Zs. u. 76. | 116-269 |

## El Hungara Antologio

Denove ni citas el la printempe aperinta Hungara Antologio. Ĉifoje parton el poemo de János Arany, en traduko de Kalocsay. «Civilizo» estas la titolo, kaj la poemo komenciĝas jene:
«Iam oni en milito / al principoj sin ne tenis, / de l' feblulo la pli forta / kion preni povis, prenis. / Nun alie jam! La mondon...» — la daŭrigon vidu en linioj H.2., V.40., V.1., V.47. kaj H.44. (ensendendaj linioj).
*Limdato:* unu monato post la alveno de la revuo. Inter solvintoj ni lotumos premiojn.

**Horizontale:** **13.** Eŭropa insula lando (R) **14.** De kiu? **15.** Reen: river' de Florenco **16.** Muzulmana ŝtatoficisto **17.** Pro kia kaŭzo? **18.** Kiutempe? **19.** Reen: elpumpita spaco **20.** Materio de korpo de animaloj (R) **21.** La duan tagon **22.** Malgrandulo (R) **23.** Purigi per akvo **24.** Libertempon **25.** Fifama nazia soldataro **26.** Stato de kontentigitoj **27.** Translokigus **28.** Malsaneca ruĝa ŝvelaĵeto sur la haŭto **29.** Parto de floro (R) **30.** KA **31.** Leviĝantan akvomason **33.** Faras memorigan skribon **35.** Ideo, kiun oni havas pri io (R) **37.** Spireblan gason **39.** Virina vestaĵo (R) **40.** Pastra kunveno (R) **42.** Larĝa apogseĝo (R) **45.** Malgranda parto (R) **46.** Malŝataj ridindigoj **48.** Malbonodora insekto **51.** Akva vegetaĵo (R) **52.** Abomenindan **53.** Plenda interjekcio **54.** Ĉasantaj rabobirdoj **57.** Rapida, energia ekmovo (R) **58.** Membro (R) **59.** Grasan fluaĵon **60.** Grupo de samtotemanoj (R) **61.** Ne tuto (R) **62.** Gajecon montra **63.** Olehava frukto (R) **64.** Sorĉa **65.** Trinkaĵo **66.** Siberia rivero **67.** Manĝigas

**Vertikale:** **2.** Bruas (kiel tamburo aŭ pafilo) **3.** Maljunan **4.** Sensperte kredema (R) **5.** FND **6.** ED **7.** Komenci iron **8.** Al ni apartenantan **9.** Aldirekti pafon (R) **10.** Verba finaĵo **11.** Sin movis enen **12.** Skala dividaĵo **17.** Malplenaĵo **18.** Amataj personoj **20.** Hungara dramverkisto, aŭtoro de Bán Bánk **21.** Blankan maran birdon **23.** Ŝafa hararo **24.** Malproksime **26.** SK **27.** Pagilon **28.** Unupunktan ludkarton **29.** Amikaj, sinceraj **30.** Korpoparto **32.** Dek procentoj (R) **34.** Peco da teksaĵo **36.** Vorto por distingi iun (R) **38.** Koncernantan certan popolon **41.** Havenan basenon **43.** Muzikilo (R) **49.** Monaj konsonantoj **50.** Reen: imitinda objekto **52.** Koloro (R) **53.** Prezentas sinsekvajn ŝanĝiĝojn **55.** Alimaniere **56.** Oka — miksite **57.** Sen... — dramo de Sartre, prezentita dum la 68a UK **58.** Maldika **60.** Rumania urbo, fonetike **61.** Generinto (R) **63.** Reen: kora sento **64.** MUA **66.** Verba finaĵo **67.** NF.

*Solvo de la krucenigmo* en n-ro 1983/2:
Kiam vi estos feliĉa, / Vi multajn kalkulos amikojn;
Nuba se venos la temp', / Sola vi restos amik'! (Ovidio)

Premion gajnis per lotumado: Nikolaj *Fjodorov,* Taŝkent, SU-Uzbekistano; *Főrizs* József, Gyöngyös, H; Vladimir *Ondryáš,* Přerov, CS.




# *Ekzameno sen risko*

**Ekzamenanto: Georgi Mihalkov**

## La Verda Koro

**Facila romaneto por komencantoj de Julio Baghy**

«La Verda Koro» estas unu el la libroj, kiuj havas feliĉan sorton. Oni multfoje reeldonis ĝin, kaj por multaj esperantistoj ĝi estis la unua Esperanto-legaĵo. Pro sia facila lingvo «La Verda Koro» servis kiel ponto, kiu gvidis la novajn esperantistojn de la lernolibro al la Esperanta beletro.

1. Kian naciecon havas Marja Bulski?
2. Kies patro laboras en Kamĉatko, en orminejo?
3. Kiu ne povas bone prononci la literon «r»?

*Limdato por respondoj:* du monatoj post la alveno de la revuo.
*Solvo de la demandoj* en n-ro 1983/2:
1. Aleksandro ne sukcesis suprengrimpi el la puto, ĉar la eskalo detruiĝis.
2. La frato de Martin estas advokato.
3. La citita strofo finas la poemon de Alessandro Mazzolini «Nokta sunhorloĝo».
Libropremion gajnis per lotumado: *Horváth* Béláné, Kalocsa, H; *Kulikov* V. Vsevolod, Omsk, SU. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

# LETERKESTO

*Bertil Englund,* Hof, FRG: Verŝajne ankaŭ vi sentas plezuron, ke la prave plendita «helik-paŝa» aperritmo de H.V. ĉi-jare — jes, kongres-jare — iĝis pli rapida, eĉ jam-jam akurata. Dankon pro atentigo pri la virtuozeco de ladblov-ensemblo el Budapeŝto, ni klopodos ĉiam informojn pri ĝiaj koncert-vojaĝoj por foje mencii en «Panoramo».

*Aleksandr V. Korĵenkov,* Tjumen, SU: La prova gustumado de la hungaraj manĝaĵoj, priskribitaj en la n-ro 1983/2, certe okazis dumtempe en Hungarlando; eble vi mencios al ni kiel ili plaĉis... Via detala bonvenigo al la nova *faktermino-rubriko* — ankaŭ tiu de aliaj legantoj — kuraĝigas daŭrigi ĝin laŭ tia populara metodo. Originalaj poemoj nur malofte mankos, tion ni povas promesi al la poezion ŝatantaj (feliĉe multaj) legantoj. Ankaŭ ni trovis la de vi menciitan recenzon iom stranga; tamen ni respektis ŝian emon publiki tiun aŭtorliston. Eble ĝi helpos por estontaj eldonistoj...

*D-ro Georgo Hevesy,* Eger, H: Laŭ nia kompreno vi konsentas kun *O. Knichal,* kiu prave rimarkis (p. 78), ke hungaroj emas intermiksi la vortojn «sukceso» kaj «rezulto» (same: problemo kaj zorgo). Temas pri neutila kaj nelogika malpliigo de la originalaj sencoj, en la nuna hungara parolo. Transigi tiaspecajn signifo-ŝanĝojn al Eo do ne estas dezirinde. Pri la kurioza «stilsuka» ni samopinias: okazis malsukcesa inversigo de «suk/plen/a stilo».

*Magnus Weisflog,* Scheibenberg, GDR: Pri medicina terminaro pluraj fakuloj okupiĝas laŭ nia scio (krom la terminaro fare de d-ro J. Hradil, en CS). Ni rekomendas preni tiucele kontakton kun la Terminologia Sekcio de la Scienca Eldona Centro de UEA (SEC) por pli vasta kunlaborado. Vian aprezon pri la rubriko de *Fakterminoj* — «vera paŝo al pliperfektigo de HV» — ni akceptos kompreneble nur post pluaj numeroj de tiu serio.

*Antonina Deĥterjova,* Moskvo, SU: Diversaj aŭtoroj — kvankam tre malofte — uzas vortojn (foje) netroveblajn en vortaroj, kio donas (ĉu nepre bedaŭrinde?) iom da kaprompo al niaj atentemaj legantoj. Ĝenerale tiuj vortoj estas kompreneblaj, se oni bone konsideras la kuntekston.
Samtempe oni devas kaj povas rimarki tiujn preserarojn, kiuj ŝajnigas freŝajn «neologismojn». Ekzemple «kriso» kaj «indencio» presiĝis foje anstataŭ *kiso* kaj *incendio* — en la kunteksto tamen oni facile agnoskis la eraron.
Ni nur malofte emas glosi vortojn; oni devas ja konscii, ke tia konduto ne tre levas la prestiĝon de nia lingvo. Prefere ni instigas niajn kunlaborantojn eviti aŭ igi klaraj la vortare ne troveblajn esprimojn. Tamen laŭ via peto ni klarigas kelkajn: *setli* (p.46) ekloĝi daŭre; *ŝlagro* (p.51) moda kanzono; *gejo* (p.51) samseksemulo; *Kafkeska* (p.77) laŭ maniero de Kafka (pro komenca minusklo estis verŝajne ne tuj klarigebla). *Perkelto* kaj *tarhono* (p.53) estas specialaj hungaraj viandaĵo, resp. pastaĵo, pro kies evitendaj Esperantigitaj nomoj ni petas pardonon. — Ni estimas vian opinion pri la novtipaj modernaj poemoj, sed permesu la atentigon, ke ekzemple en «Estingo» de *John I. Francis* (1982/4) troveblas ja rimo kaj ritmo — ĉu vi vere ne rimarkis ilin? Akceptu dankon pro viaj analizaj observoj!

*Osmo Buller,* Oulu, Finnlando: Nepre bona propagando montriĝis, ke finna ĵurnalo, *Kansan Tahto* pfte publikas niajn artikolojn, tradukitajn de vi — laste pri agrikulturo el H.V. 1982/5. La mencio «tradukita el Esperanto-revuo...» en ajna gazeto aperanta, pli serioze turnas la atenton al Eo ol afiŝaj sloganoj. La eltondaĵon ni metos en arĥivon kun danko!

*Horváth Ákos,* Budapeŝto, H: «Malfermita letero» ne estas poŝta kategorio, sed ĵurnala, sufiĉe malnova. Laste la nia (en n-ro 1983/2) devis okupiĝi pri *principoj de tradukado,* kiu temo estas sufiĉe grava por «malfermi» ĝin antaŭ la publiko, al kiu ankaŭ la kernon de la disputo ni emfazis. Pridiskuti, do kritiki aferojn, la vidpunktojn aŭ metodojn *de publikitaj verkoj,* ĉiam apartenis al gravaj taskoj de la gazetaro. Estus malutile, se redaktoraro ne eldirus sian opinion, pro ia «kavalireco» retenus sin de taŭga orientado. Ankaŭ nia *Literatura Metiejo* regule kritikas-analizas tradukaĵojn kaj neniam — la tradukantojn. Pri aliaj punktoj de via dankinda letero vi foje legos en nia revuo.


**Aperis!** **Aperis!**

**HUNGARA ANTOLOGIO**

**Eldonis: Corvina Redaktis: V. Benczik Pli ol 200 speci menoj el la hungara literaturo ekde la 12a jarcento gis nun. 447 p. 24 cm. Tole bindita. Prezo: 57,- ned.gld.**



**HUNGARA VIVO** + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Arta redaktoro: **Eszter Kiss.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Cefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechan, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H-1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas ĉe ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 214-96-162, 1900 Budapest József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78,- Ft, al eksterlando por unu jaro 96,- forintoj. + Peranto al eksterlando KULTURA (Budapest, P.O.B. 149, H-1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo Szabadság MGTSZ Gyál — 83-396
**Indexszám: 25 377 ISSN 0018–7704**





1983 OKT 27

# CTV 556 VIKING

## kolora televidilo

- Moderna formo, variaj kestokoloroj (nigra, kverkokolora, juglanduj-kolora, antracitkolora)
- Fortluma, energiosŝpara 110°-a IN-LINE bildotubo kun ekrano de diametro de 56 cm
- Kurtvojaj, novsistemaj staci-selektaj butonoj
- Taŭgas por programigi ok staciojn
- Aŭtomata ricevo de elsendoj OIRT-CCIR kaj SECAM-PAL
- Alkonekteblas kapaŭdilo, magnetofono kaj vidmagnetofono
- Garantia tempo 3 jaroj

1502 BUDAPEST Pf. 64. Telefon: 669-400 Telex: 22-58